Jen Nia Mondo 2



A follow-up radio/cassette course in Esperanto, the international language.

Jen Nia Mondo 2

J.C.Wells and others

A follow-up radio/cassette course of lessons in Esperanto



Group Five
Esperanto on radio and television

1979

ISBN 0-906632-01-3

Jen Nia Mondo 2

First published 1979

Course written by J.C.Wells

Dialogues written by Daphne Lister
Designed by Peter Oliver

Helena – Alison Williams
Petro – Karlo Bartošik
Teacher – J.C.Wells

Studio production by Peter Schilperoord
Sound recording by Acorn Audio Services

Published by Group Five
Esperanto on Radio and Television

Esperanto-Centro
140 Holland Park Avenue
LONDON, England, W11 4UF
(+44) (0)171 727 7821

Reprinted 1997

How to use this booklet

The thirteen lessons in *Jen Nia Mondo 2* are designed to follow the twelve lessons contained in the first booklet, *Jen Nia Mondo.* Accompanying cassette recordings are available of the complete lessons, and also of the dialogues alone.

If you like, familiarize yourself with the contents of each lesson before listening to the broadcast/recording. Many people, though, think that it is wiser to listen first, and to turn to the book only afterwards.

After you have heard each lesson, follow this routine:

read through the explanations

read over the text of the dialogue

refer back and forth between the two as necessary, making sure you understand everything in the text

- if you have access to a recording of the dialogue, play it over repeatedly until you know it by heart
- if possible, act out the dialogue with a friend

do the exercises in the booklet

listen to the lessons again, if possible

Antaŭnoto

Kune la du libretoj *Jen Nia Mondo* kaj *Jen Nia Mondo 2* kovras la tutan gramatikon de Esperanto kaj prezentas vortprovizon de ĉ. 1500 radikoj (t.e. ĉion el Grupoj 1 - 6 de *Baza Radikaro Oficiala,* plus 66% el Grupo 7, 17% el Grupoj 8 kaj 9, kaj pli ol cent radikojn ne troviĝantajn en *BRO).* Mi ĉerpis ekzemplojn kaj ideojn abunde el *Step by Step in Esperanto* de M.C.Butler kaj el *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (ĉefred. G. Waringhien), al kiuj mi esprimas koran dankon.

J.C.W.



Leciono 13 — Personaj Detaloj

H Ne, ne, ne! Tio estas tro.

P Kio estas tro?

H La demandaro. Kial vi donis ĝin al mi? Tio estas malŝparo de tempo.

P Kiel, kara?

H Ĝi postulas tro da detaloj.

P Donu ĝin al mi ... Dankon ... Hm. Nomo ... adreso ... loko kaj dato de naskiĝo ... jes, en ordo. Aĝo. Vi skribis nenion sub 'aĝo'.

H Kompreneble ne. Mian aĝon montras la dato de mia naskiĝo.

P Jes, sed ankaŭ sub 'sekso' vi skribis nenion.

H Mia nomo montras mian sekson.

P Mi tamen konsilas al vi, fini la taskon. Oni demandas pri via nacio, deveno, familio, profesio, religio ...

H Sendube vi donas al mi bonan konsilon, sed ĉu mi havas la sanktan devon, rakonti la tutan historion de mia vivo? Nu, se jes: *(moke)* Mi estas angla, sed mia avino, kiu mortis antaŭ kvin jaroj, naskiĝis kaj plenkreskis en Kimrujo; do parte mi devenas de la kimra popolo. Cetere mia avo —

P Kara, tute ne necesas —

H Ho, nun vi konsentas, ke tio ne necesas! Kaj kio pri religio? Ĉu mi estas kristano, islamano, adepto de Budhismo, ĉu mi kredas aŭ ne kredas je Dio — tio estas mia propra afero.

demandi : ask (a question)
demando : a question
demandaro : questionnaire, form
malŝparo : waste
tempo : time
postuli : demand
naski : give birth
naskiĝo : birth
aĝo : age
sekso : sex
konsili : advise
fini : finish
nacio : nation, -ality
deveno : origin, provenance (de + veni)
profesio : profession, job
religio : religion
sankta : holy, sacred
devo : duty (<devi)
rakonti : tell (a story)
historio : history, story
moki : mock, jeer
morti : die
kreski : grow (tr.)
plenkreski : grow up
kimro : Welshman
Kimrujo : Wales
popolo : people
cetere : besides
necesas : it is necessary
konsenti : agree
kristano : Christian (Kristo + ano)
islamano : Moslem (Islamo + ano)
adepto : adherent
je : (preposition of no fixed meaning, here,'in')
Dio : God
propra : own
afero : business, affair, thing, matter

P Jes, kara, vi tute pravas, sed –

H Sed vi konsilas al mi fini la taskon, ĉu ne?

P Efektive ne, ĉar mi ĵus rimarkis, ke jam pasis la limdato por resendo de la demandaro.

pravi : be right (< prava)
ĵus : just, just now (a moment ago)
rimarki : notice
pasi : pass (intr.)
limdato : deadline (limo + dato)
resendo : return (re + sendo)

Notoj — Notes

1. **Tro** means 'too, too much'. It can qualify an adjective, adverb, or verb.

tro granda	too big
tro maldiligenta	too lazy
tro subite	too suddenly
tro fidi	to be too trusting
Li tro parolas.	He talks too much.

It can also be followed by *da.*

tro da homoj	too many people
Vi trinkis tro da biero.	You've drunk too much beer.

2. **-es.** Correlatives ending in *-es* are possessive in meaning.

ĉies	everyone's, everybody's, of all
ties	that one's, of that one, of those
kies	whose, of whom, of which
ies	someone's, somebody's
nenies	no-one's, nobody's

3. The **indirect object** of a verb is usually expressed by a prepositional phrase with *al.* No Esperanto verb can take two direct objects both with *-n.*

Kial vi donis ĝin al mi?	Why did you give it to me?
Donu al mi la libron.	Give me the book.
Li instruas al ni Esperanton.	He is teaching us Esperanto.
Ŝi proponis al li pomon.	She offered him an apple.

With some verbs a direct object and a prepositional complement are equally possible and virtually synonymous.

Li helpis nin / *Li helpis al ni.*	He helped us. (cf. extended help to us)
Petro salutis la kongreson. / *Petro salutis al la kongreso.*	Peter greeted the congress (cf. extended greetings to it)

4. The preposition **je** is used where no other preposition covers the exact meaning one wishes to convey.

kredi je Dio	to believe in God
Ŝi ridis je ilia naiveco.	She laughed at their naivety.

5. The English adjective **right** has several meanings. Distinguish clearly among the following.

dekstra (not left)	*la dekstra flanko de la vojo*
prava (justified, morally right)	*Vi estas tute prava.*
ĝusta (correct, just right)	*Ĉu tiu respondo estas ĝusta?*
orta (90^{o})	*orta angulo*

'Tute ĝuste,' mi diris al la viro je mia dekstro, 'li estas prava, ke li insistas je iliaj rajtoj.'	'Quite right,' I said to the man on my right, 'he is right to insist on their rights.'

6. The words **nur**, **eĉ**, and **ne** precede the word or phrase they modify. Study the following examples.

Mi nur rigardas, ne parolas.	I'm only looking, not talking.
Rigardas nur mi, ne la aliaj.	It's only me looking, not the others.
Eĉ muŝon li ne povus vundi.	He couldn't hurt a fly. (lit., even a fly he could not wound)
Eĉ la profesoro tion ne memoris.	Even the professor didn't remember that.
Ili ne tute konsentas.	They don't quite agree.
Ili tute ne konsentas.	They don't agree at all.

Eĉ ne = 'not even'.

Mi eĉ ne rigardas.	I'm not even looking.

7. The suffix **-uj-** forms the name of something regularly filled with what the root denotes. Usually it means (i) an appropriate container or receptacle.

mono	money	*monujo*	purse
sago	arrow	*sagujo*	quiver
saŭco	sauce	*saŭcujo*	sauce-boat
abelo	bee	*abelujo*	bee-hive
pisti	to pound, crush	*pistujo*	mortar

It is also sometimes used (ii) to form names of countries from the name of the inhabitants:

anglo	Englishman	*Anglujo*	England
franco	Frenchman	*Francujo*	France

– and (iii) to form the name of a fruiting or flowering plant:

piro	pear	*pirujo*	pear-tree
rozo	rose	*rozujo*	rose-bush

For these last two uses, alternatives are available with (ii) *-io* and (iii) *-arbo,* thus *Anglio, Francio, pirarbo.* The tendency nowadays is to restrict *-ujo* to sense (i) above.

Ekzercu vin! Practise!

8.

MODEL Kvankam mia avino estis kimra, tamen mi mem estas angla.
(Although my grandmother was Welsh, nevertheless I myself am English).

In a similar way use kvankam .... tamen *to link appropriate pairs of sentences from among the following. (Think of the meaning and make sure the result makes sense.)*

li estas riĉa	li tute ne kreskas
hundo estas besto	mi rifuzas respondi
la vetero estas tre varma	ĝi povas esti tre fidela *(faithful)*
oni demandas pri mia profesio	li estas malkontenta
miaj gepatroj estas kristanoj	li ne volis malfermi la fenestron
la knabo *(boy)* multe manĝas	nun mi ne havas religion

9. *Q.*

Kio estas via nomo?
Kiel vi nomiĝas? *(What are you called?)*
Kiu vi estas?

A.

Mia nomo estas Mi nomiĝas Mi estas	Petro Helena Wayne ....

10. *Q.*

Kie vi loĝas?
Diru vian adreson!

A.

Mi loĝas en	Londono Nov-Jorko Parizo Scunthorpe Milwaukee ....

11. *Q.*

El kiu lando	vi venas? Petro venas? venas tiu sinjoro?

A.

El	Anglujo Kimrujo Skotlando Irlando Francujo Usono Kanado Aŭstralio Nov-Zelando Okcident-Indioj Afriko

12.

Al	Helena la studentoj la doktoro *(Ph. D.)* s-ino Pont la direktoro ŝia fianĉo *(fiancé)*	mi donis	botelon *(bottle)* da biero. la plenajn faktojn. mian karton *(card).*
		mi konsilas	atendi. ne tro esperi. sekvi *(follow)* mian ekzemplon. respekti ĉies rajtojn.

13.

MODEL mono *(money)* — senmona *(moneyless, penniless)*
signifi *(to mean)* — sensignifa *(meaningless, insignificant)*

Similarly,

ŝtato *(a state)* — . . . . *(stateless)*
kaŭzo *(a cause)* — . . . . *(causeless, unmotivated)*
eduki *(to educate)* — . . . . *(with no education, uneducated)*
formo *(shape)* — . . . . *(shapeless, unformed)*
morti *(to die)* — . . . . *(deathless, immortal)*

Translate:

sentempa	senedza	sensuna
senparola	sennoma	senamika
senlabora	sentegmenta	senespera



Leciono 14 — Domo

H Ni bezonas domon.

P Tute ne. La apartamento estas komforta, kaj la lupago estas ne tro alta.

H Mi tamen domaĝas la lupagon – ni povus uzi la monon por aĉeti domon. Kun la tempopaso naskiĝos infanoj, kaj ni bezonos pli grandan hejmon.

P Jes, mi konsentas; sed ĝis nun naskiĝis eĉ ne unu infano. Do apartamento sufiĉas ankoraŭ.

H Sed imagu, kara – imagu, se ni posedus domon en la kamparo, kun granda ĝardeno anstataŭ nur korto – ekzemple, en laga regiono, aŭ apud grenkampoj.

P Kara, kara, nun vi simple revas. Ni ne povus havi tian domon. Ni ne havas sufiĉan monon por aĉeti eĉ la tegmenton.

H Sed kun granda ĝardeno ni povus kreskigi legomojn, kaj tiel ŝpari monon. Ni povus aĉeti domon malnovan, eĉ ruinigitan, kaj ĝin rekonstrui, brikon post briko.

P Ĉu rekonstrui domon?! Vi ĉiam plendas, ke mi ne kapablas eĉ alfiksi breton. Vere, vi mirigas min. Ni loĝas en agrabla antaŭurbo, proksime al mia laborejo; ni havas belajn meblojn, televidon, fridujon, ĉion oportunan; kaj vi volas aĉeti ruinon en iu fora landoparto, kie eble mankas gaso kaj elektro, eble eĉ akvo por bankuvo aŭ duŝo.

H Sed imagu la trankvilon! Imagu la sunsubiron. Ni sidas sur la herbejo sub arbo, la ombroj plilongiĝas, la insektoj zumas –

apartamento : flat, apartment
komforta : comfortable
lupago : rent (lu/i to hire)
domaĝi : begrudge, not want to spend
povus : could
tempopaso : passing of time (tempo + paso)
ĝis : until, as far as
eĉ ne unu : not a single
sufiĉa : sufficient, enough
sufiĉi : suffice, be enough
posedi : possess
anstataŭ : instead of
korto : yard, courtyard
lago : lake
regiono : region, district
greno : corn, grain
revi : daydream
tegmento : roof
kreskigi : grow (tr.) (kresk- + -igi)
ruino : a ruin
ruinigi : to ruin (tr.)
konstrui : build
briko : brick
kapabla : capable, able
fiksi : fix
alfiksi : attach, put up (al + fiksi)
miri : marvel, be surprised
mirigi : surprise, astonish
antaŭurbo : suburb
proksime : near
laborejo : workplace (labor- + -ejo)
mebloj : furniture (meblo : item of f.)
televido : television
fridujo : refrigerator
iu : some
fora : distant (for + -a)
parto : part
manki : be missing, be lacking
gaso : gas
kuvo : tub
duŝo : shower
trankvila : tranquil, peaceful

herbo : grass
herbejo : lawn, grass (herb + -ejo)
plilongiĝi : lengthen (pli + long- + -iĝi)
insekto : insect
zumi : buzz, hum
fantazio : fantasy
toleri : tolerate, bear, stand
elspezo : expense
kia ajn : any at all
kompromiso : compromise
dumtempe : for the time being
starigi : set up (star- + -igi)
kaso : fund
ek de : starting from
biero : beer
multo : a lot (mult- + -o)
oferi : sacrifice
poŝo : pocket
nek . . . nek : neither . . . nor

P Diable, kiel ni trovus la tempon por sidi sub arbo, se ni devus rekonstrui domon? Ne, tio estas fantazio. Ni ne povus toleri la elspezon por kia ajn domo.

H Do, ni kompromisu. Ni restos en la apartamento dumtempe, sed ni starigos domokason. Ek de nun ni ŝparos monon. Se vi ĉesos trinki bieron kaj fumi, tio ŝparos multon.

P Kaj se mi oferos mian poŝmonon, kion *vi* oferos?

H Kion mi povas oferi? Mi nek trinkas bieron, nek fumas.

P Kia kompromiso!

H La kompromiso kuŝas en tio, ke *mi* konsentas resti en la apartamento, dum *vi* ŝparas monon.

Notoj — Notes

1. **Compound** nouns are readily formed in Esperanto, e.g. *lampolumo* 'lamp-light', *marobordo* 'seaside', *librovendejo* 'bookshop'. The *o* ending of the first element is commonly left out (thus: *lamplumo, marbordo),* though not if the result would be difficult to pronounce (so the *o* in *librovendejo* is retained). The meaning of a compound noun is seen by dividing it up and linking the elements, in reverse order, by a preposition: *lumo de lampo, bordo de la maro, vendejo de libroj*. The head element of the compound stands at the end; the other element is a qualifier describing it. Thus *poŝmono = mono por la poŝo* (pocket-money), while *monpoŝo = poŝo por mono* (a money pocket)

2. The preposition **el** means 'out of'. It also translates English 'of' and 'from' when they mean 'out of'.

peli iun el la domo	to drive someone out of the house
Ŝi rigardis el la fenestro.	She looked out of the window.
unu el miaj amikoj	one of my friends
Kiun el ili vi preferas?	Which of them do you prefer?
vizitantoj el multaj landoj	visitors from many countries
veki iun el dormo	to rouse someone from sleep

It is also used in the sense 'made of, consisting of'.

Vi havas koron el oro.	You have a heart of gold.
statuo el granito	a statue of granite
farita el papero	made of paper
Ĝi konsistas el kvin partoj.	It consists of five parts.

3. *Mi povus iri* I could (would be able to) go (if . . .)
Mi volus iri I would wish (like) to go (if . . .)
Mi devus iri {I would have to go (if . . .) / I ought to go}

---

4. The causative suffix **-igi** means 'to make, render, cause to be'. An intransitive verb can be made transitive by adding this suffix.

morti	to die	*mortigi*	to kill
ĝoji	to be glad	*ĝojigi*	to delight, make glad

Ni devis atendi.	We had to wait.
Li devigis nin atendi.	He compelled us to wait

Sometimes the same English verb has both meanings, transitive and intransitive. But in Esperanto they are always distinguished.

La katido dronis.	The kitten drowned.
Li dronigos la katidon.	He's going to drown the kitten.
Abunde kreskas tomatoj.	Tomatoes grow in abundance.
Arturo kreskigas tomatojn.	Arthur grows tomatoes.
La aŭto haltis.	The car stopped.
Ĉu mi haltigu la aŭton?	Shall I stop the car?

Be careful not to confuse *-ig-* with *-iĝ-* ('to become', lesson 12).
Mnemonic: in a sausage factory they **make** a p**IG** **become** a saus**IĜ**.

---

5. The preposition **ĝis** means 'till, until, as far as, up to'.

ĝis hodiaŭ	until today, up to today
iri ĝis la dua stacio	to go as far as the second station
atendi ĝis la fino	to wait till the end
fidela ĝis la morto	faithful unto death

Note also:

Vi devas fini ĝin ĝis sabato. You must finish it by Saturday. (You've got till Saturday to finish it.)

Ĝis can also be used as a conjunction.

Ni rigardis ĝin, ĝis ĝi malaperis. We watched it till it disappeared.

You have already met it, too, in the colloquial expression *ĝis revido* 'goodbye', literally 'until re-seeing' (compare 'see you!', French 'au revoir', etc.).
Alternative forms are *ĝis la revido!, ĝis la!, ĝis!*

Hence *ĝisi* (to say goodbye). The more formal word for 'goodbye' is *adiaŭ*.

Ekzercu vin! Practise!

6. **Nominative and accusative:** further points. The main principle (that the accusative ending *-n* is attached to the direct object of a transitive verb) was explained in Leciono 5. As we saw then, the complement of *esti* is not a direct object, and remains in the nominative (non-accusative). The same applies to the complement of similar verbs such as *resti* (to remain), *fariĝi* or *iĝi* (to become).

Tia estas mia sorto, kaj tia restos mia sorto.
Such is my lot, and such will my lot remain.

Ĝia beko fariĝis grandega, kaj ĝiaj kornoj fariĝis pli kaj pli longaj.
Its beak became enormous, and its horns grew longer and longer.

In greetings such as *Saluton!*, a verb is understood, thus *(Mi donas al vi) saluton,* '(I give you) greeting', hence the accusative ending. Similarly:

(Mi deziras al vi) Bonan matenon! Good morning!
Bonan tagon!
Bonan vesperon!

(Mi petas) Pardonon!

---

7. *Analyse and translate these compound nouns.*

EXAMPLE: landoparto = parto de la lando = *part of the country, area.*

vespermanĝo	poŝtkarto	aŭtovojo
sunbrilo	manĝoĉambro	grenkampo
kafkruĉo	festparolado	lupago
Skotlando	datreveno	sunsubiro
legolibro	skribpapero	dombesto

Apply a similar analysis to the following, formed with suffixes.

EXAMPLE: laborejo = ejo de/por laboro = *workplace, workshop.*

arbaro	bovino	abelujo
preĝejo	monujo	kongresano

8.

En	la domo	estas	multaj malmultaj *(few)* diversaj *(various, sundry)* kelkaj *(a few, some)* pluraj *(several)*	ĉambroj. mebloj. vizitantoj. bretoj. ŝrankoj *(cupboards)*. bestoj.
	via apartamento	troviĝas *(are to be found*		

Leciono 14

9.

Iuj *(some)* Multaj Kelkaj Pluraj	estas	bonaj , interesaj, puraj, utilaj,	sed aliaj *(others)* ne.

10.

Mi Vi	devus povus	vendi ripari elekti ĵeti *(throw)* for	kelkajn plurajn la plej *(most)* utilajn la malplej bonajn	el	miaj posedaĵoj *(possessions)*. la donacoj. viaj mebloj.

11.

Ĉu vi ne	volus povus devus	ĉesi	fumi? trinki bieron? malŝpari monon? konduti *(behave)* malbone?
		kompromisi?	

12.


MODEL	*Q.* Ĉu ni povus aĉeti novan domon? *A.* Mi opinias, ke jes *(I think so, I think we could).* Mi bedaŭras, ke ne *(I regret not, I'm afraid we couldn't).*

Ĉu vi	komprenas? ankoraŭ fumas? ĉesos plendi? trinkas bieron?	Mi	opinias, bedaŭras, ripetas *(repeat)*, hontas *(am ashamed)*, supozas, esperas, konfesas *(admit)*,	ke jes. ke ne.

13.

La	domo statuo fenestro lampo ŝuo *(shoe)*	estas farita konsistas	el	brikoj marmoro *(marble)* vitro *(glass)* plasto *(plastic)* kaŭĉuko *(rubber)*	kaj	mortero *(mortar)*. granito. ligno *(wood)*. metalo *(metal)*. ledo *(leather)*.

14. El kio estas farita via skribotablo?
la pordo de via loĝejo?
aŭtomobilo?
via monujo?
libro?
la Londona Monumento?
la Ejfel-Turo?





Leciono 15 Labora Tempo, Libera Tempo

P La malnova aŭto estas neriparebla. Kaj novan aŭton ni ne povas aĉeti.

H Hm. Se vi havus pli bonan postenon, kun pli alta salajro . . .

P Ne, ne, ne. Mia laboro estas tre interesa, kun bonaj perspektivoj. La oficejo estas en oportuna loko, la laborhoroj estas ne tro longaj, kaj mi enspezas sufiĉe da mono por niaj nuntempaj bezonoj. Mi ne intencas detrui mian karieron, nur por aĉeti novan aŭton tuj, anstataŭ post kelkaj jaroj. Se vi deziras pli da mono, kial ne mem labori?

H Mi ja laboras la tutan tagon. En la mateno mi vekiĝas kaj preparas la matenmanĝon. Dum la tago mi butikumas, zorgas pri la domlaboro, kaj kuiras. Kaj en la vespero, anstataŭ viziti kinejon aŭ teatron, mi nur rigardas la televidon. Kio pri plezuro?

P Vi troigas, kara. Ni havas hobiojn kaj interesojn, ĉu ne? Dum la somero ni ludas tenison kaj naĝas.

H Sed mi deziras naĝi en la maro, ne en naĝbaseno. Kiam laste ni vidis la maron? Kiam ni promenis en la kamparo, aŭ grimpis monton?

P Eĉ sen aŭto ni povus ĝui sportojn kaj spektaklojn. Ni povus uzi aŭtobuson aŭ trajnon. Vi tamen pravas, ni devus pli ofte amuzi nin. Diru al mi, kioma horo estas?

H Duono post la sepa, laŭ la radio.

P Nu, en la urbo oni prezentas tiun filmon 'Nepo de

neriparebla : beyond repair (ne + ripar- + -ebla)
posteno : job, position, post
perspektivo : prospect
salajro : salary, wages
oficejo : office (place) (ofic- + -ejo)
enspezi : receive (as income) (en + spezi)
nuntempa : present (nun + temp- + -a)
kariero : career
tuj : immediately, at once
ja : indeed
mi ja laboras : I DO work
mateno : morning
veki : wake (tr.)
vekiĝi : wake up (intr.)
prepari : prepare
matenmanĝo : breakfast (maten- + manĝ- + -o)
dum : during
butikumi : shop (butik- + -um- + -i)
zorgi : care for, see to
plezuro : pleasure
troigi : exaggerate (tro + -igi)
hobio : hobby
baseno : basin, pool
lasta : last
promeni : go on an outing, go for a walk
grimpi : climb
ĝui : enjoy
sporto : sport
spektaklo : show, spectacle
aŭtobuso : bus, coach
trajno : train
devus : ought
amuzi : amuse
amuzi nin : to enjoy ourselves
kioma horo : what time? (kiom + -a)
duono : half
prezenti : present, show

la Lupfantomo'. Se ni tuj iros, ni povos trafi la buson.

lupo : wolf
trafi : catch
buso : bus (= aŭtobuso)

H Post la taga laboro mi estas tro laca por postkuri buson. Ni bezonas aŭton.

postkuri : run after (post + kuri)

Notoj — Notes

1. **-el.** Correlatives ending in *-el* denote manner. We have already met *kiel* and *tiel*.

ĉiel	in every way
tiel	in that way, so thus, like that
kiel	in what way, how, like, as
iel	in some way, somehow
neniel	in no way

Mnemonic: *kiel* is an anagram of **like.**

Note the following examples involving *kiel* and *tiel*.

barakti kiel fiŝo ekster akvo	to struggle like a fish out of water
instrui fiŝon, kiel naĝi	to teach a fish how to swim
Kiel oni povas memori ĉion?	How can one remember everything?
Kiel rapida estas la trajno?	How fast is the train?
Kiel rapida estas la trajno!	How fast the train is!
Li estas tiel forta, kiel mi.	He's as strong as me (as I am).

Li estis tiel kolera, ke li rifuzis paroli.
He was so angry that he refused to speak.

Li komprenas predikon, kiel bovo muzikon.
He understands a sermon (about as well) as an ox does music.

2. **Prepositions** are frequently used as prefixes.

iri	to go	*eniri*	to enter	*eliri*	to go out (of)
veni	to come	*alveni*	to arrive	*deveni*	to originate, derive from
meti	to put	*surmeti*	to put on	*demeti*	to take off (a garment)
teni	to hold	*enteni*	to contain	*subteni*	to support (hold from below)
logi	to lure	*alloga*	attractive	*delogi*	to seduce
esti	to be	*apudesto*	proximity	*ĉeesto*	presence

Depending on their meaning, verbs formed in this way can often be used with a

direct object, transitively.

eniri ĉambron	to enter a room
transiri riveron	to cross a river
priparoli problemon	to talk about a problem
(or: *paroli pri problemo*)	
kunmetita vorto	a compound word

Prepositions can also be used with the endings *-a, -e,* etc.:

la antaŭan tagon	the previous day, the day before
resti kune	to stay together

3. **Ordinal numerals** are formed by attaching *-a* to the cardinal numerals. (If necessary, look again at Leciono 4.)

dua	second
la tria mateno	the third morning
sur ĉiu kvara paĝo	on every fourth page

In cases where the cardinal consists of two or more words, the ordinal is hyphenated to show that *-a* belongs to the whole.

la sepdek-tria ŝtupo	the seventy-third step

4. **Telling the time.** Study the following examples.

Kioma horo estas?	What time is it? (literally, how-many-th hour is?)
Estas la dua (horo).	It's two o'clock.
Estas la dek-unua.	It's eleven o'clock.
la tria kaj dek kvin	three fifteen
je la sepa kaj tridek ok	at seven thirty-eight
Baldaŭ estos tagmezo.	It will soon be noon (*mezo* = middle)
je la sesa { *matene* / *antaŭtagmeze* }	at six in the morning, 6 a.m.
je duono post la oka { *vespere* / *posttagmeze* }	at half past eight in the evening, 8.30 p.m., 20.30.

5. The suffix **-ec-** forms abstract nouns, naming a state or quality.

amiko	a friend	*amikeco*	friendship
rondo	a circle	*rondeco*	circularity, roundness
komerci	to trade	*komerceco*	commerciality
taŭga	suitable, fitting	*taŭgeco*	suitability

With an adjectival root there may be a nuance of difference between plain *-o* and suffixal *-eco:* the former gives the simple abstract noun, the latter names the quality.

blua	blue	*bluo*	blue (the colour)	*blueco*	blueness
komforta	comfortable	*komforto*	comfort	*komforteco*	comfortableness

Often, though, the two are equivalent; then, other things being equal, the shorter form is the better: *furioza* furious, *furiozo* fury. With the names of materials, -*eca* means '-ish, -like.

lano wool *lana* woollen, of wool *laneca* woolly, wool-like

vitreca rigardo a glassy look

Ekzercu vin! Practise!

6.

Mi atendis Ni volus resti	dum *(during, for)*	tri horoj. tre longa tempo. tuta semajno.
	ĝis	la fino de la ceremonio. ili adiaŭis.

7.

Ĉu vi restos Ĉu ŝi povus atendi	ĝis	duono post la tria? la sepa? morgaŭ? lundo? la venonta *(next)* monato?

8.

Dum *(while)*	Petro laboris, mi sidis hejme, Helena naĝis, li parolis,	la aliaj vi	ludis. vojaĝis. rigardis la televidon. tusis *(coughed)* ripete.

9.

Mi revenos Harvey vekiĝis	post *(in)*	du sekundoj. tri minutoj. kvar horoj. kelkaj tagoj. tuta semajno. ses monatoj. unu-du *(one or two)* jaroj. tre longa tempo.
Ni restos Mi atendis *(waited)* Mi atendas *(have been waiting)* jam	dum (for)	

Leciono 15

10.

MODEL	vidi *(to see)*	— videbla *(visible, that can be seen)*
	ripari *(to repair)*	— neriparebla *(unrepairable, irreparable)*

Similarly	manĝi *(to eat)*	— . . . . *(edible)*
	movi *(to move)*	— . . . . *(movable)*
	fleksi *(to bend)*	— . . . . *(flexible)*
	atingi *(to reach)*	— . . . . *(unattainable)*
	kredi *(to believe)*	— . . . . *(unbelievable, incredible)*
	kalkuli *(to calculate)*	— . . . . *(incalculable)*
	eviti *(to avoid)*	— . . . . *(unavoidable, inevitable)*

Translate

facile uzebla libro
kanto apenaŭ kantebla
vitro nerompebla kaj travidebla
skribi nelegeble
Esperanto estas lingvo fleksebla, facile lernebla, uzebla, kaj memorebla.

---

11. Kioma horo estas?

Say in Esperanto that it is 4 *o'clock*
9 *o'clock*
9.05
9.25
10.55
11.30
3.42 *a.m.*
7.15 *a.m.*
midnight

12.

La	unua ĉefa		el miaj	hobioj sukcesoj ideoj atingoj *(achievements)*	estas	grimpi montojn. promeni en la kamparo. naĝi. ludi tenison. rigardi televidon. kolekti poŝtmarkojn. lerni lingvojn.
	plej	granda nova interesa				

13. *Q.*

Kio estas via	laboro? profesio? okupo? *(occupation)*

A.

Mi	laboras	en	oficejo. kuirejo. fabriko. universitato. butiko.
		kiel	bakisto. studento. prelegisto. kuracisto. ĝardenisto. elektristo.
	estas		
	okupiĝas pri *(am concerned with)*		organiza laboro. domlaboro. specialaj taskoj.

14.

MODEL Respondu kiel eble plej rapide! *Answer as quickly as possible!*

Skribu Raportu *(report)* Anoncu *(announce)* la rezultojn *(results)* Finu Agu *(act)* Traduku *(translate)*	kiel eble plej	klare! baldaŭ! legeble! / aŭdeble! atente! *(attentively)* firme! precize!



Leciono 16 — Vojaĝado

H Petro! Ni devas nun decidi pri ferio.

P Sed estas iom frue, kara, ĉu ne?

H Tute ne. Se ni intencas ferii, necesas organizi la ferion. Vi devas informiĝi: necesas informiĝi pri la vojaĝo, informiĝi pri hotelo, informiĝi pri prezoj.

P Kaj ne nur informiĝi: necesas ankaŭ aĉeti la biletojn kaj mendi la hotelon.

H Tamen ne necesas mendi pasporton.

P Ne, ĉar ni jam vojaĝis eksterlanden. Pasportojn ni jam havas. Sed Helena, pensu pri la kosto! Ni penas ŝpari monon, ĉu ne?

H Jes, ni penas ŝpari.

P Kaj ni ne volas prunti monon de la banko.

H Ne, ni ne volas prunti. Sed ni bezonos ferion. En la somero ni ambaŭ bezonos ferion. Ni devas nun plani malmultekostan veturadon. Sed mi ne ŝatas inkluzivajn feriojn, kun miloj da aliaj. Se nur ni havus aŭton ....

P Nu, lui aŭton estus terure multekoste – kaj ne forgesu la problemon pri fremdaj trafikreguloj. Do ni ne veturu per aŭto. Prefere ni veturu per aviadilo aŭ per trajno.

H Domaĝe, ke ni ne plu havas aŭton ... Sed Petro, ni ankoraŭ ne decidis, kien iri.

P Ĉu vi scias, kion mi volus fari? Mi volus liberiĝi de ĉio. Mi volus perdi mian identecon kaj vagi trans la landlimojn, tute sen valizoj, libere kiel

informi : inform
informiĝi : enquire, find out the facts
vojaĝi : journey
prezo : price
bileto : ticket
mendi : order, book
pasporto : passport
eksterlanden : (to) abroad (ekster + land- + -e + -n)
kosto : cost
peni : try (hard), endeavour
prunti : borrow
banko : bank
ambaŭ : both
plano, plani : plan
malmultekosta : cheap (mal- + multe + kost-a)
veturi : travel (by vehicle), drive, ride
inkluziva : inclusive, package
miloj : thousands
lui : hire, rent
multekosta : expensive
fremda : foreign, alien
trafiko : traffic
regulo : rule, regulation
aviadilo : aircraft
domaĝe : (it's a) pity
volus : would like
identa : identical
identeco : identity
vagi : wander
trans : across
landlimo : frontier (land- + limo)
valizo : suitcase, piece of luggage

birdo — veturi tra la tuta mondo.

H Ho jes, iri tra la tuta mondo, kvazaŭ vagabondo! Vi tute ne povus vivi, vi simple perdiĝus! Ni havos nur du semajnojn, kara. Revenu al la tero!

P Serioze, Helena, mi proponas, ke ni iru per trajno al la haveno. De tie ni transiru per ŝipo la markolon. Poste ni veturu denove per trajno al iu urbeto, kie ni povos tendumi. Ĉu ne bona ideo?

H Ne forgesu rezervi sidlokojn en la vagonaro.

P Ĉu vi konsentas ferii en tendo, anstataŭ en hotelo?

H Kial ne? Kaj se la tendumejo troviĝos ĉe la marbordo, mi estos tute feliĉa.

P Se ne pluvos.

H Se nur ni havus aŭton ...

mondo : world
kvazaŭ : as if
vagabondo : tramp, vagabond
reveni : return
tero : earth

proponi : propose
haveno : harbour, seaport
transiri : cross (trans + iri)
ŝipo : ship, boat
markolo : channel (mar- + kolo)
poste : afterwards, then (post + -e)
tendo : tent
tendumi : camp (in a tent)
sidloko : seat (sid- + loko)
vagono : coach, car (of train)
vagonaro : train (vagon- + aro)
troviĝi : be found, be situated (trov- + -iĝi)
bordo : edge
marbordo : seaside
feliĉa : happy

Notoj — Notes

1. The main use of the suffix **-ad-** is to form verbal nouns.

kanti to sing — *kantado* (the act of) singing (cf. *kanto* a song)
bati to beat — *batado* a beating (cf. *bato* a blow)
suferi to suffer — *suferado* suffering
sangi to bleed — *sangado* bleeding (from *sango* blood)
semi to sow — *semado* sowing (from *semo* a seed)

The suffix *-ad-* conveys the idea of continued, repeated, or habitual action. In this sense it can be used with verb endings.

rigardadi to go on looking, to gaze
demandadi to keep asking questions
Ŝi vojaĝadis. She was always travelling, she kept travelling.

2. **Present participles active** are formed with *-ant-*. (Do not confuse *-anta* with *-ado*. Both can be translated by the English -ing form.)

kantanta birdo a singing bird, a bird which is singing
mia batanta koro my beating heart
sanganta vundo a bleeding wound
vojaĝanta komizo a commercial traveller, rep. (literally 'travelling salesman')
mordanta sarkasmo biting (mordant) sarcasm

3. The accusative is used after prepositions denoting 'place where' to convey the idea of **motion towards.** Adverbs of place, too, can take *-n* to convey the same idea. (This was noted briefly in Leciono 12.) The *-n* ending can be seen as replacing the preposition *al.*

Compare the following.

Kie li loĝas? Eksterlande. Where does he live? Abroad.

*Kie**n** li iras? eksterlande**n**.* Where is he going (to)? Abroad.

Mi naĝis en la haveno. (Kie? En la haveno!)
I swam in the harbour.

*Mi naĝis en la haveno**n**. (Kie**n**? En la haveno**n**!)*
I swam into the harbour.

Kie li laboras? Trans la landlimo.
Where does he work? Across (**on** the other side of) the frontier.

*Kie**n** vi celas? Trans la landlimo**n**.*
Where are you heading for (aiming at)? Across (**to** the other side of) the frontier.

---

4. As we saw briefly in Leciono 12, the suffix **-iĝ-** means 'become, get'.

libera	free	*liberiĝi*	to get free, to be freed
trankvila	tranquil, calm	*trankviliĝi*	to calm down, grow tranquil
edzo	husband	*geedziĝi*	to get married, become man and wife.
bona	good	*pliboniĝi*	to get better, improve (intr.)
sidi	to sit, be sitting down		
		sidiĝi	to sit down, become seated

Another use of this suffix is to make a transitive verb intransitive.
Compare:

movi to move (something) *moviĝi* to move (be in movement)

Ne sufoku min! Don't strangle me! (TRANSITIVE)

Mi sufokiĝas! I'm suffocating! (INTRANSITIVE)

Maria naskis infanon. Mary bore a child..

La bebo naskiĝis antaŭ tri tagoj. The baby was born three days ago.

La spiono detruis la sekretajn dokumentojn.
The spy destroyed the secret documents.

Mia tezo akcidente detruiĝis. My thesis got destroyed accidentally.

5. The prefix **re-** (like the English re-) has two meanings: (i) 'again, a second time' *(= denove)*; (ii) 'back' *(= returne)*. The context determines which is appropriate in a given case; the meanings may well overlap, as in *rehavi* (to have again, to get back).

(i)	*rekomenci*	to begin again
	relegi	to reread
	rekonstrui	to rebuild
(ii)	*reveni*	to return, come back
	redoni	to return, give back, restore
	resalti	to rebound, bounce back

6. **Propra** = (one's) own. **Fremda** = foreign, not one of ours, strange, alien.

via propra vico (fari ion)	your own turn (to do something)
fremdaj lingvoj	foreign languages
Korniko vundita propran voston timas.	A wounded crow fears its own tail.
Ne kredu al parolo sen propra kontrolo.	Don't believe what people say without checking it yourself.

(N B *kontroli* = to check, verify, monitor; to control = *regi, komandi)*

Ne ŝovu la nazon en fremdan vazon.	Mind your own business. (literally, don't slip your nose into someone else's bowl.)

Ekzercu vin! — Practise!

7. *Q.*

Kiel vi	venis? vojaĝas? reiros

A.

(Mi venis) (Mi vojaĝas) (Mi reiros)	piede *(on foot)*. per aŭto. per trajno. per aviadilo. per ŝipo. per helikoptero. per taksio. per aŭtobuso. per remboato *(rowing boat)*.

8.

Ili	staris sidas kuŝas kolektiĝis	apud ĉirkaŭ *(round)* kontraŭ *(opposite)*	la tablo. la direktoro. la ceteraj *(remaining, other)* studentoj. la muro. la katedralo *(cathedral)*. la horloĝo.
		ekster *(outside)* en	la ĉambro. la domo. la mezo de la kampo. la kolegio *(college)*. stadiono *(stadium, sports ground)*.

9. *Translate, bringing out the difference between the two possibilities:*

Ŝi vagis ekster *(outside)* { la ĝardeno. / la ĝardenon.

Li naĝis antaŭ *(ahead of, in front of)* { ni. / nin.

La lampo brilis en { la angulo. / la angulon.

La pupo *(doll)* falis sur { la planko. / la plankon.

La ludanta knabino *(girl)* saltis { malantaŭe. / malantaŭen.

---

10. *Using the roots of the nouns and adjectives in (a), not in that order, form words with the English meanings listed in (b). Note the many English equivalents of* -eco.

(a) sankta nuda salo simila *(like, similar)* plata *(flat)* ordinara muziko preciza krimo episkopo *(bishop)* abunda sobra reĝo sklavo patrino konstanta acida kruela blinda servuto *(serf)*

(b) abundance acidity blindness constancy criminality cruelty episcopacy flatness kingship motherhood musicality nakedness, nudity ordinariness precision salinity sanctity, holiness serfdom similarity slavery sobriety

---

11.

Metu	vian pasporton la biletojn la valizojn la bastonon *(stick)* vian ĉapon *(cap)* la magnetofonon *(tape-recorder)*	flanken *(aside)*. eksteren.	
		en	vian poŝon. la tendon. la aŭton. apartan *(separate)* ĉambron.
		sub	la seĝon. la liton.

Q.

Kien vi iras?
Kien kondukas *(lead)* tiu vojo?

A

Nenien.
Aliloken (al alia loko).
Hejmen.
Supren *(up, upwards, upstairs)*.
Malsupren.
Valen.
Antaŭen.
Inferen. (infero = *hell)*

13. *Choose the appropriate member of each pair to fill the blank.*

kolektas/kolektiĝas	Nun la funebrantoj *(mourners)* .... cirkaŭ la tombo.
	Ĉu vi .... poŝtmarkojn?
komencos/ komenciĝos	Morgaŭ mi ....novan lecionon.
	La leciono baldaŭ ....
vendis/ vendiĝis	Tiu libro ....tre bone.
	Mi jam .... la lastan ekzempleron *(copy)*.
balancis/balanciĝis (balanci *tr. = to rock up and down)*	La vento .... la branĉojn.
	La ŝipo .... sur la maro.
ruli/ruliĝi (ruli *tr. = to roll)*	Li volis .... la ŝtonon *(stone)* supren ĝis la pinto *(summit, tip)*.
	Sed ĉiam la ŝtono komencis .... malsupren.



Leciono 17 — Akcidento

P Saluton, Helena! Ĉu vi bone fartas? Hej, kiel laca kaj pala vi aspektas! Kial? Kio okazis? Kie vi estis?

H Mi iris al la hospitalo por viziti mian avon. Li akcidentiĝis. Li falis hejme kaj rompis la kruron.

P Ho, la kompatinda! Sed trankviliĝu, kara. Kiel li fartas nun?

H Li estas en granda doloro. Li estas kovrita de ŝvito, kaj lia gorĝo brulas pro soifo. Kaj li povas manĝi absolute nenion.

P Sed kiel okazis tia akcidento?

H Nu, li falis. Kaj – kiel vi scias – li loĝas sola, do neniu aŭdis la bruon, kiam li falis. Pro tio li kuŝis sangokovrita sur la planko, ĝis li estis trovita de iu najbaro. Tiam li febris jam pro la ŝoko de la akcidento kaj pro perdo de sango.

P Sidiĝu, kara. Ankaŭ vi estas iom ŝokita.

H Vere, jes. La flegistino diras, ke la kuracisto preskribis por li amason da drogoj. Efektive, ŝajnas ke li estis injektita je tiom da drogoj, ke li apenaŭ rekonis min! *(Ploras)*

P Trankviliĝu, kara.

H Lia voĉo estas mallaŭta kiel flustro, kaj li tusas terure.

P Kompatinda avo. Kia afero! Sed diru al mi, ĉu li estas ankoraŭ en danĝero? Kion diris la kuracisto?

H La granda danĝero pasis, dank' al Dio. Laŭ la

farti : fare, be in (good or bad) health
aspekti : look

hospitalo : hospital
akcidento : accident
akcidentiĝi : suffer an accident
fali : fall
rompi la kruron : break one's leg
kompatinda : piteous, poor

dolori : hurt
doloro : pain
kovri : cover
ŝviti, ŝvito : sweat
gorĝo : throat
bruli : burn
soifi : be thirsty
soifo : thirst

bruo : noise
pro : because of, owing to
sango : blood
najbaro : neighbour

febro : fever
ŝoki, ŝoko : shock
sidiĝi : sit down (sid- + -iĝi)
flegi, flegistino : nurse
drogo : drug
injekti : inject
tiom (da) : so much, so many
rekoni : recognise

voĉo : voice
flustri : whisper
tusi : cough

afero : affair, business, matter, thing
danĝero : danger

Dio : God
dank' al Dio : thank God

	kuracisto, mia avo havas bonan ŝancon plene resaniĝi.	ŝanco : chance, prospect resaniĝi : recover (re- + san- + -iĝi)
P	Do vidu, la krizo estas solvita. Post sep tagoj en la hospitalo, ĉio estos en ordo.	krizo : crisis
H	Sed eble la kuracisto parolis tiel nur por trankviligi min. Eble li mensogis.	mensogi : lie, tell a lie
P	Ne, ne, kara. Certe via avo baldaŭ resaniĝos. Aŭskultu, morgaŭ mi venos kun vi al la hospitalo por vizite lin denove.	aŭskulti : listen
H	Dankon, kara.	

Notoj — Notes

1. Correlatives ending in **-al** denote motive. We have already met *kial*. Those ending in **-om** denote quantity; we have already met *iom* and *kiom (da)*.

ĉial	for every reason, on all grounds
tial	for that reason, therefore, accordingly, so
kial	why, for what reason, on what grounds?
ial	for some reason
nenial	for no reason, without any reason
ĉiom	all (of it), the whole quantity
tiom	so much, so many, as much, as many
kiom	how much, how many, what quantity?
iom	a bit, a little, some, rather, to some extent
neniom	none (at all), no quantity

2. The correlative table **(la tabelo de la korelativaj vortoj)**. The 45 correlatives we have now covered may be arranged in a logical table of five items by nine (five beginnings and nine endings). To recapitulate, they are as follows.

every	**ĉi-**	**-a**	of . . . . kind (Leciono 10)
		-al	for . . . . reason (*ĉi-supre)*
that	**ti-**	**-am**	at . . . . time (Leciono 9)
		-e	in . . . . place (Leciono 9)
what	**ki-**	**-el**	in . . . . manner (Leciono 15)
		-es	. . . . one's (Leciono 13)

some	**i-**	**-o**	.... thing (Leciono 10)
		-om	....quantity *(ĉi-supre)*
no	**neni-**	**-u**	.... one (Leciono 9)

Be careful with the stress in *nenía* etc.

---

3. The particle **ajn** with a *ki*-correlative corresponds to English -ever.

kie ajn — wherever

kia ajn — whatever kind of

al kiu ajn nacio ili apartenas — whatever nation they belong to

Kiu ajn diris tion al vi, (tiu) estas malsaĝulo. — Whoever told you that is a fool.

Kiam ajn vi venos, mi vin volonte akceptos. — Whenever you come, I shall receive you gladly.

Donu al mi kion ajn vi volas. — Give me whatever you please.

Ajn can also be used with *i*-correlatives (or, classically, with *ki-*) to mean 'any at all'.

Iu ajn / *Kiu ajn* / *Ĉiu* } *povas!* — Anyone can!

Venu iam ajn, venu iel ajn, sed venu, mi petegas! — Come at any time, by any means, but come, I implore you!

You are recommended not to use *ajn* in questions or with negatives, since such use is considered an anglicism.

Whatever are you doing? — *Kion (diable) vi faras?* (NOT: * *Kion ajn vi faras?)*

I haven't got anything at all. — *Mi havas absolute nenion.* (NOT: * *Mi ne havas ion ajn.)*

Compare the following three equivalents of 'however'.

However (no matter how) you solved the problem, I'm pleased with the result.
Kiel ajn vi solvis la problemon, mi estas kontenta pri la rezulto.

However (how on earth) did you solve the problem?
Kiel do vi solvis la problemon?

However (nevertheless), you solved the problem.
Tamen vi solvis la problemon.

---

4. Participles in *-ita* can be used with *esti* to form a **passive conjugation** describing **completed action.** The preposition introducing the agent is *de.*

esti savita	to be rescued, to be saved
mi estis savita	I was rescued
li estas savita	he is saved (he has been saved)
ni estos savitaj	we shall be saved
ili estus savitaj	they would be rescued

Malamiko vundis lin. — *Li estis vundita de malamiko.*

Eble rabistoj kaptos la infanojn. — *Eble la infanoj estos kaptitaj de rabistoj.*

NB. *Li estis kovrita de sango = sango kovris lin,* he was covered in blood.
li estis kovrita per sango = iu kovris lin per sango, someone had covered him with blood.

---

5. The suffix **-inda** means 'worthy of', 'worth -ing'.

atenti	pay attention	*atentinda*	worthy of attention
fidi	to trust	*fidinda*	trustworthy, reliable
honti	to be ashamed	*hontinda*	shameful
diskuti	to discuss	*diskutinda*	worth discussing
kompati	to pity	*kompatinda*	piteous, poor

---

6. The preposition **pro** = because of, on account of, owing to. The difference between *pro* and *por* is that *pro* refers to the cause, *por* to the purpose.

Mi ridis pro lia naiveco. — I laughed at (because of) his naïvete.

Mi faris tion { *por amuzo.* / *pro ĝentileco.* } — I did that { for fun. / for politeness' (sake). }

Pro najleto bagatela pereis ĉevalo plej bela.
Because of a trifling little nail there perished a horse most beautiful.

Ekzercu vin! — Practise!

7.

MODEL	*Q.* Kie estas la libro? Ĉu vi vendis ĝin?
	A. Jes, ĝi estas vendita.

Kie estas la lakto? Ĉu vi finis ĝin? ....

Kie estas la taso? Ĉu vi rompis ĝin? ....

Kie estas la ĉemizo *(shirt)*? Ĉu vi lavis ĝin? ....

Kie estas la pano? Ĉu vi bakis ĝin? ....
Kaj la krizo? Ĉu vi solvis ĝin? ....
Kaj la valizoj? Ĉu vi pakis *(pack)* ilin? ....

8.

MODEL	*Q.* Kio okazis? Ĉu iu atakis *(attack)* lin? (Rabistoj.) *A.* Jes, li estis atakita de rabistoj.

Kio okazis? Ĉu iu forĵetis ĝin? (La infanoj.) ....
Kio okazis? Ĉu iu punis *(punish)* lin? (La instruisto.) ....
Kio okazis? Ĉu iu puŝis *(push)* ŝin? (Alia knabino.) ....
Kio okazis? Ĉu iu gajnis *(win)* la premion *(prize)*? (Tiu alta sinjoro.) ......
Kio okazis? Ĉu iu premis *(press)* la butonon *(button)*? (Tiu frenezulo *(madman)*.) ....

9.

Kiel Kion Kiam Kial Kiom	ajn vi skribis, certe	via avino ne estis kontenta. tio ne efikis *(had an effect, worked)*. vi ne sukcesis esprimi *(express)* ĉion, kion vi volis. via patrino estis forte ŝokita.

10. *Make a grid, nine squares by five. Fill each square with one of the correlatives* (tabelvortoj), *together with its English translation. Use each one in a sentence.*

11. *Q.*

Kiel vi fartas? *(How are you?)* Saluton! Kiel vi?

A.

Bone, dankon. Tre bone. Tute bone. Iom laca (mi estas). Terure okupita *(busy)*.	Kaj vi?

12.

<table>
<tr>
<td rowspan="2">La studentoj
La fotografistoj
La gvidistinoj
(gvidi = to guide)
La kandidatoj</td>
<td>sekvis
akompanis
(accompanied)
konsolis
(consoled)</td>
<td colspan="3">unu la alian (one another).</td>
</tr>
<tr>
<td>paroladis
babilis (chatted)
gestis (gestured)</td>
<td>unu</td>
<td>al
kun</td>
<td>la alia.</td>
</tr>
<tr>
<td>La libroj
La skatoloj
La flagoj
La krucoj
(crosses)</td>
<td>staras
troviĝis
estos pakitaj</td>
<td>unu</td>
<td>post
apud
antaŭ
super (above)
sub</td>
<td>la alia.</td>
</tr>
</table>



Leciono 18 — De Kapo ĝis Piedoj

H Tiu filmo vere timigis min.

P Ĉu vere? Mi trovis ĝin ne timiga, sed ridiga.

H Ho jes, nun vi povas sidi trankvile kaj diri tion, sed kiam la atakanto kuŝigis Paŭlon surdorse, deŝiris lian ĉemizon, pugnobatis lian kapon, kaj skrapis per akraj ungoj liajn vangojn, bruston kaj ventron, vere preskaŭ senhaŭtigis lin –

P Tion mi apenaŭ rimarkis, mi devas konfesi. Sed preskaŭ mi saltis el la seĝo, kiam Rakela perdis la jupon, kaj tiu fripono pendigis ŝin per la longaj blondaj haroj kaj vipis ŝin per leda zono –

H Fi! Vi tion ĝuis!

P Jes, je tiu punkto mi verŝis oranĝosukon sur mian kravaton.

H Ho, Petro, kial vi ne viŝis ĝin tuj per la poŝtuko? Vidu! Vi makulis ankaŭ vian jakon, eĉ la manikon.

P Mi ne rimarkis. Mi brosos ĝin.

H Broso ne sufiĉos. Vi devus pli bone prizorgi viajn vestojn. Pasintan semajnon vi ŝiris la pluvmantelon, kaj viaj ŝuoj estas en terura stato.

P Ne gravas. Sed miaj piedoj estas en bona stato, kaj ankaŭ miaj manoj, okuloj, buŝo, kaj .... aliaj korpopartoj. Pli gravas la korpo ol la vestoj, ĉu ne?

H Certe via lango estas en bona stato. Ĉiam vi trovas argumenton.

P Ne sulkigu la frunton. Venu. Sidiĝu, kaj klinu la kapon sur mian ŝultron. Ĉu komforte?

timi : fear
timigi : frighten (tim- + -igi)
ataki : attack, assail
kuŝigi : lay, lay out (cause to lie, kuŝ- + -igi)
dorso : back
ŝiri : tear
deŝiri : tear off
ĉemizo : shirt
pugno : fist
pugnobati : punch (pugno + bati)
kapo : head
skrapi : scrape
akra : sharp
ungo : nail, fingernail
vango : cheek
brusto : chest
ventro : belly, stomach
haŭto, senhaŭtigi : skin
konfesi : confess, admit
jupo : skirt
fripono : rascal, villain
pendi : hang (intr.)
pendigi : hang (tr.)
blonda : blonde, fair
haro : (a) hair
haroj : (head of) hair
vipi : whip
ledo, leda : leather
zono : belt
fi : fie! for shame!
suko : juice
kravato : tie
tuko : cloth
poŝtuko : handkerchief
makulo, makuli : stain, spot
jako : jacket
maniko : sleeve
broso, brosi : brush
prizorgi : look after (pri + zorgi)
pasinta : previous, last
ŝuo : shoe
stato : state, condition
mano : hand
okulo : eye

H Viaj genuoj estas iom ostaj, sed ... Ĉu mi havas tiel belan vizaĝon kiel Rakela?

P Jes, pli belan. Kaj *(paŭzas inter ĉiu)* pli belajn lipojn ... kaj mentonon ... ankaŭ pli belan kolon ... kaj orelojn ... brakojn ... manojn ... krurojn ... Ni enlitiĝu.

buŝo : mouth
korpo : body
lango : tongue
argumento : argument
sulko, sulkigi : furrow, wrinkle
frunto : forehead
sulkigi la frunton : frown
klini : lean (tr.)
ŝultro : shoulder
genuo : knee
osto : bone
vizaĝo : face
paŭzo, paŭzi : pause
lipo : lip
mentono : chin
kolo : neck
orelo : ear
brako : arm
fingro : finger
kruro : leg

Notoj — Notes

1. More examples of the causative suffix **-igi**, which can be attached to any kind of base, making a transitive verb.

bela	beautiful	*beligi*	to beautify
facila	easy	*faciligi*	to make easy, facilitate
milda	mild	*mildigi*	to mitigate, alleviate
linio	a line	*liniigi*	to align, line up (tr.)
for	away	*forigi*	to remove, do away with
pli profunda	deeper	*pliprofundigi*	to deepen (tr.), make deeper
malpli bona	less good	*malplibonigi*	to spoil (tr.)
sen vualo	without a veil	*senvualigi*	to unveil
en la tero	in the earth	*enterigi*	to bury, inter
al la bordo	to the edge, bank (of a river), shore	*albordigi*	to bring in to the edge

By changing the ending, other parts of speech can logically be derived.

sana	healthy, in good health	*saniga*	healthy, health-giving, salubrious
enui	to be bored, fed up	*enuige prediki*	to preach boringly
egala	equal	*egaligo*	equalization

2. More examples of the suffix **-iĝi**; it, too, can be attached to any kind of base, making an intransitive verb.

La krizo pliprofundiĝis.	The crisis deepened (grew deeper).
La ŝipo albordiĝis.	The ship landed (came in to the edge).
Iom post iom la dancistino senvualiĝis.	Little by little the dancer cast off her veils (became unveiled).

NB. *Kial ne plilongigi la jupon?* — Why not lengthen (make longer) the skirt?
La tagoj plilongiĝas jam. — The days are already lengthening (becoming longer).

---

3 **Just.** Distinguish carefully:

ĵus	just (= just now, just a moment ago);
tuj	immediately (in time or place);
ĝuste	right, just (= exactly);
nur	only, merely, just (= nothing more than);
apenaŭ	scarcely, hardly, only just.

Study the following examples.

Mi ĵus alvenis.	I've just arrived.
tuj post la komenco	just after the beginning
ĝuste tio, kion mi deziris	just what I wanted
Mi nur ŝercas.	I'm just joking.
Mi {apenaŭ trafis / preskaŭ maltrafis} la aviadilon.	I {only just caught / almost missed} the plane.

Compare also

justa decido	a just (fair, equitable) decision

---

4. Certain verbs may be used either personally or **impersonally.**

Ne gravas!	It doesn't matter.
Ĉu gravas, ke li forgesis?	Does it matter that he forgot?
Antaŭ ĉio gravas via sano.	Your health matters above all (lit., before all).
La mondo ŝajnas vasta.	The world seems vast.
Ŝajnas, ke mi malpravas.	It seems I'm wrong.

As the complement of an impersonal verb, Esperanto uses an adverb *(-e)* where English uses an adjective (Leciono 10). This includes cases where an infinitive or a noun clause can be taken as the subject of the verb.

*La prelego estis tre interes***a**. The lecture was very interesting.

BUT *Estas interese, ke la maŝino paneis ĝuste je tiu momento.*

It is interesting that the machine broke down just at that moment.

Estis interese, aŭdi tion. It was interesting to hear that.

Ŝajnis kurioze, ke la kapro ne havis barbon.

It seemed odd that the goat had no beard.

---

5. The suffix **-ero** names a particle or element of something.

polvo	dust	*polvero*	a speck of dust
programo	a programme	*programero*	an item (in a programme)
fajro	fire	*fajrero*	a spark
sablo	sand	*sablero*	a grain of sand
mono	money	*monero*	a coin

Kion diras vespo (wasp), *kiam ĝi pikas* (stings)?

—*Bonan vesperon!*

---

6. Names of the **letters of the alphabet** *(la literoj de la alfabeto)*. Each vowel *(vokalo)* is named by its own sound (*A* like English 'ah', etc.); each consonant *(konsonanto)* is traditionally named by its own sound plus *o*.

Thus *ĉekoj* (cheques) is spelt aloud *ĉo – e – ko – o – jo.*

A word has as many syllables *(silaboj)* as it has vowels; a diphthong *(diftongo)* counts as one vowel. The principles of Esperanto syllabication are somewhat different from those of English: a syllable tends to end in a vowel.

Examine the following.

kapitalisto	= *ka – pi – ta – lís – to*
kontenteco	= ***kon*** *– ten – té – co*
agrabligi	= *a – gra – blí – gi*
neŭtrala (neutral)	= *neŭ – trá – la*
neutila (non-useful)	= *ne – u – tí – la*
balai (to sweep)	= *ba – lá – i*
palaj (pale, pl.)	= *pá – laj*
praulo (an ancestor)	= *pra – ú – lo*
fraŭlo (a bachelor)	= *fráŭ – lo*

---

7. The suffix **-um-** has (in principle) no fixed meaning. It forms words whose relation to the root is vague and not readily expressed by any other suffix.

plena	full	*plenumi*	to fulfil
brako	arm	*brakumi*	to embrace
korto	a courtyard	*kortumo*	a court (of law)
malvarma	cold	*malvarmumi*	to catch a cold
kolo	neck	*kolumo*	collar *
kruco	cross	*krucumi*	to crucify **
ĉaro	cart, chariot	*ĉarumo*	wheelbarrow
proksima	near	*proksimuma*	approximate

* and similarly *buŝumo* (muzzle), *kalkanumo, plandumo* (heel and sole of a shoe) etc.

** and similarly *ŝtonumi* (stone to death), *pendumi* (execute by hanging) etc.

Unlike other Esperanto suffixes, *-um-* is not productive, except to create nonce-forms. Each word containing it must be learnt separately.

Ekzercu vin! — Practise!

8. *Analyse and translate the following, putting each in a suitable sentence.*

(i) enŝipigi entuziasmigi ĉetabligi senfoliigi fianĉinigi amasigi endormigi allitigi senesperigi subakvigi


(ii) enŝipiĝi entuziasmiĝi ĉetabliĝi .... *etc.*

9.

Kantado Dancado Legado	estas bona rimedo *(means)*	por	doni plezuron *(pleasure)* al ĉiuj. amuzi infanojn. forigi enuon. buntigi la vivon. plilarĝigi la mensan horizonton *(widen the mental horizon).* konsoli la animon *(soul).*
Legi rakontojn) *(stories)* Kanti (himnojn) Danci (valson) *(waltz)*	prezentas taŭgan ideon tre bone servas		

10.

Bedaŭrinde, *(unfortunately)*	mi	ankoraŭ ne *(not yet)*	estas preta forvojaĝi.
			prezentis min *(introduced myself).*
Feliĉe,			kapablas paroli Esperanton.
		ne plu *(no longer)*	estas universitatano.
			deziras loĝi en la kamparo.
			havas familion.





Leciono 19 — Lingvoj

P Diru al mi, Helena, kia homo estas Davido?

H Ho, tre klera. Li studis natursciencon en la universitato, kaj nun li instruas lingvojn al la supera klaso de la gimnazio.

P Do li estas ne nur sciencisto, sed ankaŭ lingvisto! Kiel li lernis paroli la lingvojn sufiĉe bone por instrui ilin?

H Unue, li ĉeestis kursojn kaj sukcesis ĉe la ekzamenoj; due, li multe vojaĝis; kaj trie, li edziĝis kun Maria, kiu edukiĝis en Francujo kaj tre flue parolas la francan.

P Mi ne miras, do, ke li bone progresis. Cetere, laŭ mi, estas multe pli facile kompreni lingvon, ol paroli ĝin. Ĉu vi ne konsentas?

H Jes, kaj duoble pli facile legi ol skribi. La unua problemo, kiam oni komencas lerni novan lingvon, estas prononci la vortojn ĝuste, precipe kie temas pri nekutimaj sonoj.

P *(ridante)* Kaj la dua estas kompreni la sencon!

H Davido donis al mi bonan konsilon. Laŭ li, kiam oni ne komprenas, oni ripete demandu: 'Kion signifas tiu vorto?', aŭ: 'Kiel oni nomas tion?' . . .

P Mi konsentas. Oni ne hezitu fari demandojn. Tiel oni lernas paroli ĝuste. Laŭ mi, tre gravas la ĉiutaga konversacio. En la lernejoj oni tro ofte studas nur klasikaĵojn.

H Sed mi preferas ankaŭ havi iom da poezio kaj literaturo. Tio donas pli da intereso.

klera : well-educated, cultured
studi : study
naturscienco : natural sciences
supera : top (super + -a)
klaso : class
gimnazio : grammar school, high school
unue : first (unu + -e)
ĉeesti : attend (ĉe + esti)
kurso : course
ekzameno : examination
due : secondly (du + -e)
edziĝi : get married (edz- + -iĝi)
eduki : educate
flue : fluently
franca : French
progresi : make progress
duoble : twice, doubly
duoble pli facile : twice as easy
prononci : pronounce
vorto : word
ĝuste : right
temas pri : it's a matter of
kutima : usual, customary
sono : sound
ridante : laughing(ly) (rid- + -ant- + -e)
senco : sense
konsili : advise
konsilo : advice
ripeti : repeat
signifi : mean
heziti : hesitate
ĉiutaga : everyday, daily (ĉiu + tag- + -a)
konversacio : conversation
lernejo : school (lern- + -ejo)
klasika : classic(al)
poezio : poetry

P Por mi la ĉefa problemo estas ne la gramatiko, sed la vortprovizo. Oni devas lerni tiom da vortoj!

H Almenaŭ en Esperanto tiu problemo ne estas tiel akra, kiel en aliaj lingvoj. Tre helpas la sistemo de afiksoj.

P Konsentite; tamen, ĝi restas problemo. Iam mi komencis lerni la rusan; sed mi devis rezigni pro la amaso da vortoj, kiujn mi tute ne povis memori!

H Aŭskultu: venis al mi ideo. Ni volas ekzerciĝi pri la franca lingvo, ĉu ne? Tiel ni estos pretaj por nia ferio. Davido kaj Maria povus helpi nin! Ni invitu ilin vespermanĝi ĉe ni!

P Se ili venos, ni estos kvar. Kaj inter tiu kvaro estos parolata nur la franca.

H Aŭ Esperanto! Esperanto estas kvinoble pli facile lernebla, ol la franca!

ĉefa : main, principal
gramatiko : grammar
provizi : provide, supply
vortprovizo : word-stock, vocabulary
almenaŭ : at least
sistemo : system
afikso : affix
konsentite : agreed (konsent- + -it- + -e)
rusa : Russian
rezigni : give up
venis al mi ideo : I've had an idea
ekzerci : exercise, practise (tr.)
inviti : invite
vespermanĝi : dine (vesper- + manĝi)
kvaro : foursome
parolata : spoken (parol- + -ata)
kvinoble : five times, fivefold
lernebla : learnable (lern- + -ebla)

Notoj — Notes

1. After *se, kiam, dum* Esperanto often **logically** requires a **future** tense *(-os)* where English uses the present. This applies whenever the time reference is to the future.

Se vi havos okazon, skribu al mi.	If you have a chance, write to me.
Kiam mi estos riĉa, mi aĉetos luksan skribmaŝinon.	When I am rich I shall buy a luxury typewriter.
Mi laboros, dum vi ludos.	I'll be working while you're playing.

(Compare the following:

Se vi havas kvin gefratojn, vi apartenas al granda familio.	If you have five siblings, you belong to a large family.
Kiam oni estas riĉa, oni havas multajn amikojn.	When one is rich one has a lot of friends.
Estas eble lerni, dum oni ludas.	It is possible to learn while you play.

2. As we have seen (Leciono 12), the preposition in expressions of weight, measure or quantity is usually **da**.

tuno da ŝtalo	a tonne of steel
tri pecoj da ĉokolado	three pieces of chocolate

Li manĝis tiom da kuko, ke li krevis. He ate so much cake he burst.

But since *da* always follows a word indicating a quantity or portion of some indefinite whole, it is not appropriate in cases where the second noun phrase is definite. Instead, *el* or *de* may be used.

Kiom el vi pakis la valizojn?	How many of you have packed your suitcases?
Donu al mi iom de tiu teo.	Give me some of that tea.

The phrase *multe da homoj* (a large number of people) is virtually identical in meaning with *multaj homoj* (many people): some say the former emphasises their collectivity, the latter their individuality.

---

3. **Numerals** can have various grammatical endings attached.

due	secondly
unuo	a unit
dekduo	a dozen

The suffix **-on-** forms fractions.

kvarono	a quarter
tri dekonoj	three-tenths
duone freneza	half crazy

The suffix **-obl-** forms multiples.

kvarobie	fourfold
trioble kvar estas dek du	3 x 4 = 12

The suffix **-op-** forms collective numerals.

kvaropo	a foursome
duope	two at a time, in pairs

Decimals: a comma *(komo)* is usually used where English has 'point'.

du komo kvin (2,5)	two point five (2.5)

---

4. The verb ending for the present participle passive is **-ata.**

parolata lingvo	spoken language
mia plej amata	my most beloved
nekonata aŭtoro	an unknown author

It is appropriate where the action of the verb is seen as **still in progress** or **regularly repeated.** It can be used with *esti* to form another set of passive

forms (compare Leciono 17).

esti amata	to be loved
mi estis amata	I was loved, have been loved (in my time)
li estas amata	he is loved
ni estos amataj	we shall be loved
ili estus amataj	they would be loved

Ĉiuj sciis tiujn faktojn. — *Tiuj faktoj estis sciataj de ĉiuj.*

S-ro Smit bezonas la lampon. — *La lampo estas bezonata de s-ro Smit.*

La kliento (customer) *ŝuldas* (owes) *preskaŭ du mil markojn.*
— *Preskaŭ du mil markoj estas ŝuldataj de la kliento.*

Compare

La preĝejo estis konstruata en 1871 (was being built, was in course of construction)

La preĝejo estis konstruita en 1871 (was built, had been completed/got completed that year)

Some actions can be equally well seen as completed or as continuing:

Fumado estas {*permesita* / *permesata*} *nur en la maldekstraj sidlokoj.*

Smoking is permitted only in the left-hand seats.

---

5. **Gramatikaj terminoj** (grammatical terminology).

pronomo (pronoun) *prefikso* *verbo infinitiva* *numeralo* *substantivo* (noun)

adverbo Poste mi decidis redoni la tri grandajn kukojn al mia edzino.

verbo indikativa *difina artikolo* *prepozicio* *poseda adjektivo*
adjektivo *sufikso*

'Kato' estas singulara, 'katoj' plurala. La pluralo estas signata de la finaĵo -j. 'Kato, katoj' estas nominativaj, 'katon, katojn' akuzativaj. La akuzativo, kiu montras la rektan objekton, estas signata de la finaĵo -n. La adjektivo akordas nombre kaj kaze kun la substantivo. En la supra frazo (sentence), *'mi' estas la subjekto; 'mia edzino' estas la nerekta objekto. 'Mi amas' estas aktiva verboformo, 'mi estas amata' pasiva. 'Kaj' estas konjunkcio, sed 'se' estas subjunkcio* (subordinating conjunction). *'Ha' estas interjekcio. La vorto 'tridek' konsistas el du radikoj* (roots). *Prefikso kaj sufikso ambaŭ estas afiksoj. En Esperanto ne ekzistas gramatika genro* (gender).

Ĉu pantalono estas singulara aŭ plurala?
– *Supre singulara, sed malsupre plurala.*

Ekzercu vin! — Practise!

6.

Mi ne Ne ĉiuj el ni Ĉu vi (. . . . ?) Jes, mi	komprenas parolas lernis bone posedas *(have mastery of)*	la	anglan. francan. germanan. rusan. grekan *(Greek)*. ĉinan *(Chinese)*. japanan. italan *(Italian)*. hispanan *(Spanish)*.
		Esperanton.	

7.

Laŭ mi Laŭ mia amikino Laŭ la raporto	estas ŝajnas povas esti montriĝas esti	malfacile, tre simple, ioma problemo,	kompreni la uzon de la akuzativo. elekti la ĝustan prepozicion. lerni la genron de latinaj substantivoj. laŭregule uzi 'igi' kaj 'iĝi'. distingi inter transitivaj kaj netransitivaj verboj. memori vortojn.
Iafoje *(sometimes)* De tempo al tempo Ofte	mi ne povas mi bone sukcesas		

8.

La Tiu	ĉaro veturilo *(vehicle)* kaleŝo *(coach)*	estis estas	tirata *(drawn)*	de	du bovoj. kvar ĉevaloj.	
	kamiono *(lorry, truck)* aŭtomobilo traktoro modelo	estis estas	funkciigata movata	de	elektra benzina *(petrol)* dizela *(diesel)* potenca *(powerful)* vapora *(steam)*	motoro *(motor, engine)*.

9.

MODEL	Duoble kvin estas dek.

Kiom estas kvaroble kvin?
trioble sep?
duoble dek tri?
sesoble ok?
dekoble cent?

10.

MODEL	Duone kvin estas du kaj duono (du komo kvin). Kvinone du estas kvar dekonoj (nul komo kvar).

Kiom estas kvarone dek ok?
duone dek sep?
trione kvin? *(recurring* = ripetiĝanta)
kvinone kvar?
sepone dudek?
dekone kvardek tri?
centone mil tricent kvardek unu?

11.

Se vi	erare respondos, premos la butonon, pafos *(shoot)* tra la truo *(hole)*, turnos *(turn)* la ŝaltilon *(switch)*, trafos la celon *(target)*, streĉos *(stretch, wind up)* la risorton *(spring)*,	aŭdiĝos stranga sono. falos la pilko *(ball)*. lumos *(light up)* ruĝa lampo. aperos verda indikilo (indiki = *to indicate*). ŝvelos baloneto *(a balloon will inflate)*.

12

Kiam mi	frapos *(knock)* je la pordo, finos la vojaĝon, venos hejmen, atingos la domon,	mi vidos mian edzinon. min salutos miaj geinfanoj. mi eniros tuj min bonvenigos *(welcome)* la familianoj. kredeble la hundo atakos *(attack)* kaj ĉasos *(chase)* min.

13. Say the following addresses aloud.

EXAMPLE	Mi loĝas je numero *(number)* 1078, Monto-strato. – mil sepdek ok –

Mi loĝas je numero 21, Monto-strato.

36,

345,

1165,

6902,



Leciono 20 — Aĉeti

H Ĉu vi havas la liston, kara?

P Jes, kompreneble.

H Donu ĝin al mi, mi petas ... Dankon ... Hm. Sapo, lesivpulvoro, dentopasto, ciro, maizflokoj, kremo – Kio? Tabako? Alumetoj? Sed ĉu vi ne ĉesis fumi?

P Cigaredojn, jes. Mi ĉesis fumi cigaredojn. Sed anstataŭe mi decidis fumi pipon. Se mi tute ĉesus fumi, mi fariĝus vere malbonhumora. Almenaŭ pipo ne estas tiel malsaniga, kiel cigaredoj.

H Temas ne pri sano, sed pri mono.

P *(rapide)* Kion vi opinias pri tiuj roboj?

H Tiu ruĝa estas bela ... Ĝin mi preferas laŭ stilo, sed ne laŭ koloro. Se la koloro estus alia, mi tre ŝatus ĝin. Pri la tabako – –

P Ĉu vi ne diris, ke vi volas aĉeti ŝtofon? Ĉu vi mezuris, kiom vi bezonas?

H Jes, mi bezonas sufiĉe grandan pecon: ĝi devas esti longa du metrojn, kaj unu metron larĝa. Sed tiajn varojn mi preferas aĉeti en la urbocentro, en granda magazeno. En la malgrandaj butikoj la prezoj estas tro altaj.

P Jes, ĉi tie ĉio estas tro multekosta. Oni trovas pli favorajn prezojn en la superbazaro. Ni iru tien.

H Ĉu ni trafu la buson?

P Ne, ĝi kostas tro. Kontrolu la liston denove.

sapo : soap
lesivpulvoro : washing powder
dentopasto : toothpaste
ciro : shoe-polish
maizo : corn, maize
floko : flake
kremo : cream
tabako : tobacco
alumeto : match
pipo : pipe
-us : (conditional ending)
humoro : temper, mood
malsaniga : unhealthy (mal- + san- + -ig- + -a)
sano : health
robo : (woman's) dress
stilo : style
koloro : colour

ŝtofo : material, cloth
mezuri : measure

sufiĉe granda : quite big
peco : piece
metro : metre
larĝa : wide, broad
varoj : goods
centro : centre
magazeno : department store

favora : reasonable, favourable
bazaro : market
superbazaro : supermarket

kontroli : check

H Karotoj, ovoj, pano, butero, margarino, inko, poŝtmarkoj . . . Aĥ, vidu, komencis pluvi. Se ni iros al la superbazaro, ni malsekiĝos.

P Do ĉu ni tamen aĉetu ĉi tie, en la malgrandaj butikoj?

H Kial ne? Finfine oni ne povas kalkuli ĉiun pencon.

P Ĝuste. Jen la tabakbutiko, trans la strato. Ni eniru!

karoto : carrot
ovo : egg
butero : butter
margarino : margarine
inko : ink
aĥ : (interjection)
malsekiĝi : get wet (mal- + sek- + -iĝi)
finfine : after all
kalkuli : count, calculate
penco : penny
eniri : enter, go in (en + iri)

Notoj — Notes

1. The preposition **po** = at the rate of, apiece , @.

cigaredoj po 25 rubloj por cento cigarettes at 25 roubles a hundred

veturi po cent kilometroj hore to go at 100 kph

vendi pogrande to sell wholesale

Venos po du reprezentantoj el ĉiu grupo.
Two representatives will come from each group.

Po du policistoj gardis la elirejojn.
i.e. Two policemen guarded each exit.

Some grammarians insist that *po* should never be followed by the accusative, being a preposition; others maintain that *po* governs only a numeral, not a following noun, which may therefore properly be accusative. Hence usage is divided in a sentence such as:

Ili manĝis po du pomoj(n). They ate two apples each.

Note that *po* does NOT correspond to English 'per'.

po du dolaroj por kilogramo @ $2 per kilo

po kvindek mejloj { *hore* / *en horo* / *en ĉiu horo* } at fifty miles an hour

2. The conditional verb-ending *-us* (Leciono 9) is used for **hypothetical suppositions.** It has no time-value. If (in the past, present, or future) something *were* **(-us)** the case (which is doubtful), then something else *would be* **(-us)** the case.

Se li venus, li pagus If he { came, / were to come, } he would pay.

Se mi estus sana, mi estus feliĉa. If I were well I should be happy.

Mi ne povus tion kredi, se mi ne vidus ĝin per miaj propraj okuloj.
I couldn't believe that if I hadn't seen it with my own eyes.

3. A further use of the **accusative** is in expression of duration, extent, degree, cost, etc., where there is no preposition.

resti tri horojn	to stay three hours
longa du metrojn / *du metrojn longa*	two metres long
aĝi kvardek jarojn	to be forty years old, aged 40
Ĝi kostas kvin pundojn.	It costs £5.
Ĝi pezas kvardek kilogramojn.	It weighs 40 kg.[1]

It is also used in dates.

dimanĉon	on Sunday
la saman tagon	(on) the same day
la postan matenon	(on) the following morning
mardon, la 19-an de decembro	(on) Tuesday, December 19th

(But compare the usual forms

je la 8-a (horo)	at 8 o'clock
en (la jaro) 1985	in 1985)

All these uses can be covered by saying that the accusative ending *-n* replaces *je, dum, po,* or some other preposition. Note also the following, where *-n* may be considered to replace *al:*

mi veturos {*Parizon* / *al Parizo*}	I shall travel to Paris
rilate {*tion* / *al tio*}	in connection with that, in relation to that
responde {*vian demandon* / *al via demando*}	in answer to your question

[1] 'To weigh' in this sense = *pezi*. But note that 'to weigh' = 'to measure the weight of' = *pesi*.

---

4. **'Deliberative' questions** are asked and answered with *-u*.

Ĉu mi iru?	Should I go? (Am I to go?)
– Jes, iru!	– Yes, go. (Yes, do.)
Ĉu ni aĉetu panon?	Shall/should we buy (some) bread?
– Jes, ni aĉetu!	– Yes, let's (buy some).

Compare

Kiom li pagu?	How much is he to pay? (must/should/shall he pay)
Kiom li pagos?	How much is he going to pay? (will he pay)

5. Two special suffixes, *–ĉjo* and *-njo*, are used to form **pet-names**, male and female respectively. They are attached to the truncated first part of the root

Vilhelmo	William	*Vilĉjo*	Bill
Johano	John	*Joĉjo*	Johnny
Sofia	Sophia	*Sonjo*	Sonia
patro	father	*paĉjo*	Dad
patrino	mother	*panjo*	Mum, Mom

6. **Use of tenses.** Where an English perfect with 'have' refers to a situation still continuing, Esperanto (like many other languages) uses a present tense rather than a past tense.

Mi loĝas en Londono (jam) tri jarojn.

I have been living / I have lived } in London for three years (already).

Dum multaj jaroj li estas rigardata kiel brila sciencisto.

For many years he has been { regarded as / considered } a brilliant scholar.

Cf. *... li estis rigardata ...* { ... he was regarded ... / ... he had been regarded ... }

Ekzercu vin! — Practise!

7.

Mi S-ro Dupont F-ino Ŝulc Miaj gepatroj	vizitis	Usonon Kenjon Aŭstralion Sovet-Union Hindujon	nur pli ol jam	unu fojon *(once)*.	
				du tri kvar	fojojn *(times)*.

8. *Make true statements.* (Kiel rapide moviĝas ..... ?)

Testudo *(tortoise)* Homo Ĉevalo Aŭtomobilo Pasaĝeraviadilo (pasaĝero = *passenger)* Satelito Lumo	moviĝas marŝas *(walk, march)* veturas flugas	po	???	kilometroj mejloj	hore. sekunde.

8. *Select one clause from (a) and one from (b) in such a way that when combined they make a logical sentence.*

(a) Se brulus fajro,
Se vi imitus *(imitate)* min,
Se vi kombus *(comb)* viajn harojn,
Se vi konservus *(keep, preserve)* la viandon *(meat)* en la frostujo *(freezer)*,
Se la ŝafisto ne gardus *(guard)* la ŝafojn,
Se la ŝnuro ne estus rompita,

(b) ne necesus nun ĝin ligi *(tie)*.
ilin kaptus la lupo.
vi ne farus tiom da eraroj.
mi estingus *(extinguish)* ĝin tuj.
ili ne aspektus *(look)* tiel malorde.
ĝi ne putrus *(go bad, putrefy)*.

9.

MODEL Elefanto estas speco de mamulo. *An elephant is a kind of mammal.*
Vespo estas speco de insekto.
Mevo estas speco de birdo.

Sort out the following:

abelo, aglo *(eagle)*, akrido *(locust)*, alaŭdo *(lark)*, anaso *(duck)*, apro *(boar)*, azeno *(donkey)*, baleno, bovo, cervo *(deer)*, ĉevalo, gruo *(crane)*, ĝirafo, hirundo *(swallow)*, hundo, kamelo, kapro, kato, koko *(cock, fowl)*, kolombo *(pigeon)*, korniko, korvo *(raven)*, kukolo *(cuckoo)*, kuniklo *(rabbit)*, leono, leporo *(hare)*, lupo, moskito, muso, muŝo, najtingalo *(nightingale)*, papago *(parrot)*, papilio *(butterfly)*, pasero *(swallow)*, pavo *(peacock)*, pigo *(magpie)*, pulo *(flea)*, rato, sciuro *(squirrel)*, strigo *(owl)*, struto *(ostrich)*, ŝakalo *(jackal)*, tigro, urso *(bear)*, vulpo *(fox)*, vulturo.

10. Taksu *(estimate)* la mezuron de objektoj ĉirkaŭ vi.

MODEL: La fenestro estas 68 centimetrojn alta kaj 3 metrojn larĝa.

La tablo . . .
La muro . . .

La plafono . . .

La radiatoro . . .

La ŝranko . . .

NOTE. Metric units are of course customary in Esperanto. There are words for imperial units, though they are not likely to be understood in many countries: colo *inch,* futo *foot, etc.*

11. Kiom kostis la libro? — Dek dolarojn. ($10)

. . . cigaredoj?	Tridek kvin pencojn	(35p)
. . . dentopasto?	Kvindek pencojn.	(50p)
. . . kremo?	Unu pundon.	(£1)
. . . poŝtmarkoj?	Sepdek du cendojn *(cents)*.	(72¢)
. . . inko?	Dudek sep kaj duonan cendojn	(27½¢)
. . . motorciklo?	Du mil markojn.	(DM 2000.–)
. . . pelto *(fur)*?	Kvincent pundojn.	(£500)
. . . pano?	. . .	(45p)
. . . robo?	. . .	($199)
. . . matraco *(mattress)*?	. . .	(£185)
. . . kaserolo *(saucepan)*?	. . .	(DM 17.–)

12. Kiel longe daŭris *(lasted)* la prelego? — Unu horon.

. . . diskutado?	Kvardek minutojn.
. . . paŭzo *(pause, interval)*?	Sep kaj duonan minutojn.
. . . ferioj?	Dek tagojn.
. . . oficperiodo *(term of office)*?	Tri jarojn.

13.

Ĉu ni	serĉu konvenan *(suitable, appropriate)* butikon? skribu noton *(note)* al la najbaroj? metu la oranĝojn en reton *(net)*? elektu pli delikatan *(delicate, fine)* ŝtofon? baru *(bar, block)* la vojon? prefere studu pli utilan fakon *(subject, speciality)*? petu ion, kio diferencas *(differs)* de la ordinaro?	Jes, ni . . . -u. Ne, ni ne . . . -u.



Leciono 21 — La Sezonoj

H Mi malamas la vintron.

P Sed kial?

H Ĝi estas malbela sezono.

P Ho ne! Eĉ dum la vintro la naturo estas bela. Kio povus esti pli bela, ol frosta nokto kun arĝenta, hela luno, kaj brilaj steloj? Aŭ neĝo en la sunbrilo?

H En la kamparo jes, eble. Tie la aero estas freŝa kaj pura, kaj oni sentas sin vigla kaj energia. Sed ĉi tie en la urbo la vintro konsistas nur el pluvo kaj nebulo.

P Vi troigas, kara, kiel kutime. Dum decembro neĝis, kaj eĉ pluvo kaj nebulo povas esti belaj.

H Ne al mi! Cetere, en la urbo neĝo estas nur ĝeno. Ĝeno!

P Sed eĉ en la somero la vetero povas esti malagrabla. Ĉu vi ne memoras, kiel vi maltrankviliĝis dum la fulmotondro pasintan aŭguston?

H Mi tamen preferas la someron.

P Ĝi baldaŭ venos.

H Kara, estas januaro: aŭ ĉu vi tion ne rimarkis?

P Jes, sed ni preskaŭ atingis la finon de la monato; februaro estas nur mallonga; kaj en marto la printempo montros sin, kun siaj floroj kaj folioj kaj birdkantoj.

H Se oni trovas sin en urbo, sen ĝardeno, eĉ la printempo ne estas tre bela.

P Ĉu pri la vintro vi plendas, aŭ pri la urbo?

malami : hate (mal- + ami)
vintro : winter
sezono : season

dum : during, while
naturo : nature, the natural world
frosta : frosty
arĝenta : silvery
hela : bright, clear, light
luno : moon
stelo : star.
aero : air
senti : feel (tr.)
si : oneself (etc.; reflexive pronoun)
vigla : lively, vigorous
energio : energy
nebulo : fog
decembro : December
ĝeno : nuisance, inconvenience

fulmo : lightning
tondro : thunder
fulmotondro : thunderstorm
pasinta : last
aŭgusto : August

januaro : January

atingi : reach
fino : end
februaro : February
marto : March
printempo : spring
sia : its (etc.; reflexive)

H Pri ambaŭ, sed precipe pri la vintro. La vintron mi malamas.

LA MONATOJ DE LA JARO

januaro	februaro	marto	aprilo	majo	junio
julio	aŭgusto	septembro	oktobro	novembro	decembro

Notoj — Notes

1. The **reflexive** pronoun refers back to the subject of the clause: **si, sin** = himself, herself, itself, themselves, oneself.

Li lavas sin.	He washes himself, gets washed.
Ŝi kantis al si.	She sang to herself.
ŝipo, kiu sin movas	a ship that moves itself, is self-propelled
Ili ĵetis sin sur min.	They threw themselves on me.
Ĉiu vidis sin en la spegulo.	Everyone saw himself (themselves) in the mirror.

Compare *si (= la frenezulo)* and *li* (= someone else) in the following pair of sentences:

La frenezulo ne plu parolas al {si. / li.} The madman doesn't talk to {himself / him} any more.

2. **Sia** = his own, her own, its own, their own, one's own.

Li alte estimas sian amikon.	He esteems his friend highly.
La farmisto plugis siajn kampojn.	The farmer ploughed his fields.
Ili konscias pri sia inteligenteco.	They are conscious of their intelligence.
Oni devas fari sian devon.	One has to do one's duty.

Sia, too, always refers back to the subject of the clause it is in.

Compare:

La artisto pentris sian portreton.	The artist painted his own portrait.
La artisto pentris lian portreton.	The artist painted his portrait (i.e. someone else's).

3. *Si* and *sia* can never be the subject of a sentence. Furthermore, they are used only when referring to third-person subjects.

Li venis kun sia edzino.	He came with his wife.
BUT *Lia edzino kaj li venis*	His wife and he came.

Mi venis kun mia edzino. I came with my wife.

In compound and complex sentences, any verb suffices to establish a new subject to which *si* will then refer.

La sinjoro ordonis al la servisto vesti lin (= la sinjoron) por la ceremonio.
The gentleman ordered the servant to dress him for the ceremony.

La sinjoro ordonis al la servisto vesti sin (= la serviston) pli dece.
The gentleman ordered the servant to dress himself more fittingly.

Jozefo ordonis al siaj servistoj balsami lian patron.
Joseph ordered his servants to embalm his father.

Li vidis anĝelon starantan kun glavo en sia mano.
He saw an angel standing with a sword in his hand.

The rules for *si* generally correspond to those for English 'himself', etc.: but those for *sia* versus *lia* must be carefully studied, since both are 'his' in English. Work out the meaning of these sentences, which are ambiguous in English but clear in Esperanto:

Johano rakontis al Petro pri sia aŭto.
Johano rakontis al Petro pri lia aŭto. } John told Peter about his car.

---

4. We have already met **mem**, which translates '-self' when this serves merely to emphasize the preceding noun or pronoun.

Mi devas mem fari ĉion.	I have to do everything myself.
Li mem tondis la gazonon.	He himself mowed the lawn.
Mi deziras paroli al li mem.	I wish to speak to him himself (not to anyone else).

Compare

Mi deziras mem paroli al li. I wish to speak to him myself.

With an imperative, *mem* emphasizes an understood *vi*.

Faru mem! Do it yourself.

---

5. Both *sin-* and *mem-* can be used as prefixes.

sindona	dedicated, selfless ('self-giving')
memevidenta	self-evident
sindefendo / *memdefendo*	self-defence

---

6. The suffix **-aĉ-** shows disparagement. It indicates that the speaker has a poor opinion of the thing in question.

hundaĉo	cur
domaĉo	hovel
skribaĉi	to scribble, scrawl

7. The pair **ju . . . des** corresponds to English 'the . . . the' in phrases such as the following. *Ju* and *des* are always followed by *pli* or *malpli*.

ju pli granda, des pli bona — the bigger the better

Ju malpli li pensas, des pli li parolas.
The less he thinks, the more he talks.

Ju pli peza la aveno estis, des pli profunde ĝi kliniĝis.
The heavier the oats were, the deeper they bent down.

Ekzercu vin! — Practise!

8. *Fill in the gaps.*

Post januaro venas . . .
. . . venas inter marto kaj majo.
Julio tuj sekvas . . .
Julion tuj sekvas . . .
La lasta monato de la jaro estas . . .
La plej . . . monato estas februaro.
En kiu monato vi naskiĝis?
Kiun monaton vi preferas? Kial?
Kiun daton ni havas hodiaŭ? (EKZEMPLO: Hodiaŭ estas la tria de majo.)

9.

Li Petro Ŝi Linda Ĉiu	lavis sin je la naŭa horo. vestis sin tuj poste. estas en sia ĉambro. vere honoras siajn gepatrojn! skribas en sia kajero *(notebook).* kulturas *(cultivates)* sian ĝardenon. sidas kviete *(quietly)* en sia angulo.

10.

Ili La pasaĝeroj Petro kaj Helena La sekretariinoj	vere kreas *(create)* por si problemojn. devos demeti siajn ŝuojn kaj ŝtrumpojn *(stockings).* ŝirmis *(sheltered)* sin per ombrelo *(umbrella).* sopiras *(are longing)* reiri hejmen, por revidi siajn parencojn *(relatives).*

11. *Fill in the gaps with an appropriate pronoun.*

Mi legas al ... en ... lito, por amuzi ....
Vi
Li
Ĉiu
Ni
Neniu

12. *Translate* and use in a sentence:*

bildaĉo, bluaĉa, cigaredaĉo, ĉambraĉo, eraraĉo,
fumaĉi, grizaĉa, kantaĉi, leteraĉo, parolaĉi,
poetaĉo, silentaĉi, ŝercaĉoj, veteraĉo

* *Many of these do not have one-word equivalents in English.*

13

MODEL Rozo estas speco de floro.
Aveno estas speco de greno *(grain, cereal).*
Karpo *(carp)* estas speco de fiŝo.
Ŝtalo estas speco de metalo.

Sort out, similarly:

arĝento, bronzo, dianto *(carnation, dianthus)*, ezoko *(pike)*, fero *(iron)*, gobio *(gudgeon)*, haringo *(herring)*, hordeo *(barley)*, kankro *(crayfish)*, konvalo *(lily-of-the-valley)*, kupro *(copper)*, lado *(tinplate)*, latuno *(brass)*, lilio, lotuso, maizo, malvo *(mallow)*, oro, papavo *(poppy)*, plumbo *(lead)*, sekalo *(rye)*, sorgo *(sorghum)*, stano *(tin)*, ŝarko, tritiko *(wheat)*, tulipo, zinko.



Leciono 22 — Restoracia Manĝo

H Petro, kion vi faras en la kuirejo?

P Mi kuiras.

H Stulta demando meritas stultan respondon. Tamen, kion vi kuiras?

P Mi decidis, ke ni manĝos hejme. Mi regalos vin. Mi faros ĉion, kvazaŭ en restoracio, por ke vi ripozu.

H Jen ĉarma ideo. Do, mi estas via eleganta kliento, kaj vi estas kelnero. Bonvolu doni al mi la menuon.

P Sed unue bonvolu sidiĝi. Vidu, mi jam primetis la tablon.

H Jes, vi bele aranĝis la tranĉilojn, la forkojn kaj la kulerojn; kaj mi aprobas vian elekton de tablotuko.

P Dankon! Do jen la menuo, sinjorino. Bonvolu elekti kion vi preferas.

H Mi ne scias kion mi preferas. Kelnero, kion vi rekomendas, ke mi mendu?

P Efektive, mi konfesu, ke mi jam elektis la manĝaĵojn. Mi bone konas viajn preferojn . . . Mi insistas, ke vi lasu ĉion al mi.

H Konsentite.

P Do la viando estas kokidaĵo. Ĝi estos kuirita laŭ la ĉina maniero. Recepton mi trovis en la internacia kuirlibro.

H Mmmm, mi flaras belan odoron.

P Nu, mi jam boligis la kokidaĵon. Nun mi kombinas

kuirejo : kitchen (kuir- + -ejo)

stulta : silly, stupid
meriti : deserve

regali : treat, entertain
restoracio : restaurant
ripozi : rest

eleganta : elegant
kliento : customer
kelnero : waiter
bonvolu : be so good as to
menuo : menu
primeti : set, lay (pri + meti)

aranĝi : arrange
forko : fork
kulero : spoon
aprobi : approve

rekomendi : recommend

insisti : insist
viando : meat
kokidaĵo : chicken (kok- + -id- + -aĵo)
koko : cock, rooster
ĉina : Chinese
maniero : manner
recepto : recipe
flari : smell (tr.)
odoro : smell, odour, scent
boli : boil (intr.)
kombini : combine

ĝin kun florbrasiko kaj pizoj, kun cepoj kaj fungoj. Poste mi enmiksos iomete da faruno kun salo kaj pipro, kaj iom da spico. Ni manĝos ĝin kun rizo, kompreneble — — ne kun terpomoj.

H Kaj antaŭe?

P Fruktosuko, ĉu ne, prefere al supo?

H Bone; kaj poste?

P Poste, glaciaĵo.

. . . . .

(Poste)

H Mmmm, kara, donu vian glason, por ke mi verŝu por vi ankoraŭ iom da vino.

P Je via sano! Sed ĉu vi manĝis sufiĉe?

H Dankon, mi estas tute sata. La manĝo gustis bonege — vidu la malplenajn telerojn! Sed, kelnero — al kiu mi pagu la kalkulon?

P Ni forgesu la kalkulon. Sed se vi povas proponi iom da trinkmono, ni povas iri al la trinkejo!

brasiko : cabbage
florbrasiko : cauliflower
pizo : pea
cepo : onion
fungo : mushroom
miksi : mix
iomete da : a little
faruno : flour
salo : salt
pipro : pepper
spico : spice
rizo : rice
terpomo : potato
antaŭe : beforehand (antaŭ + -e)
suko : juice
supo : soup
glacio : ice
glaciaĵo : ice cream
ankoraŭ iom da : some more
sata : full, satiated
telero : dish, plate
kalkulo : bill, check
proponi : offer, propose
trinkmono : tip, gratuity
trinkejo : pub, bar

Notoj — Notes

1. As seen in Leciono 9, the verb ending *-u* is used in **commands**, requests, desires, advice and so on.

Respondu! Answer!

A politer or milder way of putting requests is with *bonvolu* ('have the good will to') plus the infinitive.

Bonvolu respondi. Please reply, be so good as to reply.

Bonvolu fermi la pordon. Would you close the door, please?

2. In **indirect** speech, *-u* is used in a *ke*-clause to express the same ideas: commands, requests, desires, advice and so on.

Mi insistas, ke vi respondu. I insist that you answer.

La generalo ordonis, ke trupoj estu senditaj. The general ordered that troops be sent.

La kelnero rekomendas, ke ni mendu bifstekon. The waiter recommends that we order steak.

Mi konsilas, ke vi atente aŭskultu. I advise that you listen carefully.

3. **Por ke** ('in order that, so that') implies a desire, and is accordingly followed by *-u*.

Voku laŭte, por ke ŝi aŭdu. Call loudly {so that she hears. / for her to hear.}

Li {parolas / parolis} malrapide, por ke oni komprenu lin.

He {speaks / spoke} slowly, so that people {shall/may/can / should/might/could} understand him.

---

4. As was briefly mentioned in Leciono 12, the suffix **-aĵ-** means 'thing'. More precisely, this can be

(i) a concrete object possessing the quality named:

necesaĵo	a necessity
novaĵo	a novelty, news
manĝeblaĵo	something edible, a foodstuff

(ii) the external manifestation of (some verb):

diktaĵo	a dictation (something dictated)
akiraĵo	an acquisition
segaĵo	sawdust
pakaĵo	baggage, luggage

(iii) a food made of something:

porkaĵo	pork (from *porko* 'pig')
kokidaĵo	chicken
glaciaĵo	an ice

---

5. Paired conjunctions.

aŭ . . . aŭ either . . . or

Ni devas aŭ venki aŭ morti! We must conquer or die!

kaj . . . kaj both . . . and

Ni devas kaj manĝi kaj trinki. We must both eat and drink.

nek . . . nek neither . . . nor

Ni devas nek manĝi nek trinki. We must neither eat nor drink.

ĉu . . . ĉu whether . . . or (whether)

Ĉu pro timo, ĉu pro fiereco, li nenion respondis.
Whether from fear or from pride, he answered nothing.

jen . . . jen now . . . now, sometimes . . . at other times

Li parolas jen france, jen germane. {He speaks now French, now German. / Sometimes he speaks French, sometimes German.}

6. The prefix **ek-** denotes (i) the beginning of an action, or (ii) a sudden or momentary action.

(i)	*ekbruli*	to catch fire
	ekplori	to burst into tears
	Baldaŭ ŝi ekdormis.	Soon she fell asleep *(= endormiĝis).*
	Li eksidis.	He sat down *(= sidiĝis).*
(ii)	*ekbrili*	to flash
	ekkapti	to snatch
	Ektremis la tero.	The earth shuddered. *(tremi* to tremble)

---

7. The prefixes **dis-** and **mis-** are rather as in English: *dis-* means 'in different directions' (separation, dispersal), while *mis-* means 'wrongly'.

disdoni	to distribute, give out
disfali	to fall apart
miskonduti	to misbehave
misprezenti	to misrepresent
mispaŝo	a false step

---

8. The preposition **krom** means 'apart from, not counting'. In a positive sentence it means 'as well as, besides'; in a negative one, 'except (for)' [1].

Ŝi estas bela, kaj krom tio tre riĉa.	She is beautiful, and besides that very rich.
Krom glaciaĵo mi manĝos ankaŭ ĉokoladon.	As well as an ice I'll have a chocolate too.
Mi akceptos ĉion, krom unu kondiĉo.	I accept everything, except for one condition.
Iris ĉiuj krom mi.	They all went except me.

[1] A possible synonym here is *escepte de.* Some people disapprove of the latter, though, since basically *escepti* is a verb meaning 'to except, to exempt'.

Ekzercu vin! Practise!

9.

Suzana Jasmena Haruno	proponis, insistas, rekomendas, deziras, konsilas, petis, eble sugestos,	ke	ni oni la infanoj	manĝu kelkajn frandaĵojn *(delicacies)*. mendu florbrasikon. evitu viandon. malmendu *(cancel)* la pladon *(dish)* da legomoj. trinku nur akvon. ne manĝu krudajn *(raw)* cepojn. elektu deserton *(dessert)*. dividu *(divide, share)* la oranĝojn. ricevu pli bongustan nutraĵon *(food)*. prenu salaton *(salad)* kun oleo *(oil)* kaj vinagro *(vinegar)*.

10.

En printempo mi	semas semojn *(sow seeds)*. preparas la grundon *(soil)*, fosas kaj rastas *(rake)*, laboras en la ĝardeno,	por ke en aŭtuno ni ĉiuj	rikoltu rikoltojn *(harvest crops)*. ĝuu freŝajn legomojn. satigu la stomakon. bone manĝu. havu ĝardenajn produktojn.

11. *Work out the meaning of the following words and then use them in sentences.*

bluaĵo bovaĵo bovidaĵo diraĵo oraĵo sensencaĵo ŝafidaĵo trinkaĵo
ekaperi ekflugi ekintenci ekloĝi ekparoli ekstari ekvidi ekvojaĝi
misaŭdi misgvidi miskalkuli miskompreni mislegi mispafi mispaŝi
mistraduki

12.

	Kverko *(oak)* estas speco de arbo.
MODEL:	Banano estas speco de frukto.
	Karoto *(carrot)* estas speco de legomo.

Sort out similarly:

abio *(fir)*, abrikoto *(apricot)*, beto *(beetroot)*, betulo *(birch)*, brasiko, cepo, citrono *(lemon)*, ĉerizo *(cherry)*, daktilo *(date)*, fabo *(bean)*, fago *(beech)*, fazeolo *(green bean)*, figo, frago *(strawberry)*, frambo *(raspberry)*, kokoso *(coconut)*, kukumo *(cucumber)*, kukurbo *(marrow, squash)*, melono, mirtelo *(bilberry, blueberry)*, olive, oranĝo, palmo, persiko *(peach)*, piceo *(spruce)*, pino *(pine-tree)*, piro *(pear)*, pizo, platano *(plane)*, pomo, pruno *(plum)*, rafano *(radish)*, ribo *(current)*, rubuso *(blackberry)*, saliko *(willow)*, terpomo, tomato.



Leciono 23 — Turistoj kaj Turismo

H Ĉu vi rimarkis, ke la urbo estas plena da turistoj?

P Jes, plena. Hodiaŭ matene unu turisto alparolis min. Li demandis, kie estas garaĝo, por ke li aĉetu benzinon. Post kiam mi direktis lin al la garaĝo, li petis informojn pri la poŝto, pri telegramoj, kaj eĉ pri publika necesejo!

H Nekredeble! Eble vi aspektis kiel helpema policano.

P Pri tio mi dubas.

H Hieraŭ mi vidis usonanon, kiu provis ŝanĝi la radon de sia aŭto.

P Kie estis tio?

H Ĉe la dekstra flanko de la ponto.

P Kiel vi sciis, ke li estas usonano?

H Ĉar li uzis usonan parolmanieron por demandi pri garaĝo.

P Kial li serĉis garaĝon? Ĉu ankaŭ li volis aĉeti benzinon?

H Ne, ne: por ripari la difektitan radon, vi stulta!

P Hmm. Ĉu vi scias, ke dek milionoj da vizitantoj venis al nia lando en la pasinta jaro?

H Tio estas grandega nombro.

P Ili venas el nordo kaj sudo, el okcidento –

H – kaj oriento. Hieraŭ mi vidis ankaŭ tri japanojn, sur la benkoj apud la telefonejo.

P Ho, ĉu vere? Sed la turismo estas malbone organizita en nia urbo: ĉu vi ne konsentas?

turisto : tourist
garaĝo : garage
benzino : petrol, gasoline
post kiam : after (conj.)
direkti : direct
telegramo : telegram
publika : public
necesejo : lavatory, toilet (neces- + -ejo)
aspekti : look (like)
helpema : helpful (help- + -ema)
polico : police
usonano : American (Uson- + -ano)
provi : try, attempt
ŝanĝi : change (tr.)
rado : wheel
dekstra : right (-hand)
ponto : bridge
ripari : repair, mend
difekti : damage, spoil
miliono : million
nombro : number, amount
nordo : north
sudo : south
okcidento : west
oriento : east
japano : Japanese
benko : bench
turismo : tourism

Anstataŭ lasi la vizitantojn sen helpo, la urba konsilantaro devus starigi turisman servon por helpi ilin.

H Jes, eble en la mezo de la ĉefplaco, aŭ en la stacidomo.

P Kaj krom starigi tian servon, ĉu la urba konsilantaro ne devus presigi prospekton, kun informoj pri la vidindaĵoj kaj tiel plu?

H Mi kredas, ke tiu prospekto jam ekzistas.

P Jes, sed nur en unu lingvo. Ĝi devus esti plurlingva. Tio vere signifus paŝon antaŭen.

H Precipe, se ĝi inkluzivas Esperanton!

konsilantaro : council (konsil- + -ant- + -aro)
starigi : set up (star- + -igi)
servi : serve
mezo : middle
stacio : station
stacidomo : station (-house)
krom : besides, apart from
presi : print
presigi : have printed
prospekto : prospectus, brochure
vidindaĵoj : sights (vid- + -ind- + -aĵo)
kaj tiel plu : and so on
ekzisti : exist
paŝo : step, pace
antaŭen : ahead, forwards
inkluzivi : include

Notoj — Notes

1. Two further prepositions: **malgraŭ** 'in spite of', **preter** 'beyond, past, by'.

malgraŭ tio	in spite of that
preter ĉiuj limoj	beyond all limits
Li pasis preter mi.	He passed by me.

Note that sometimes an English preposition corresponds to an Esperanto prepositional phrase (two or more words), or vice versa.

interne de la domo	inside the house
laŭlonge de la strato	along the street
antaŭ mi	in front of me
malgraŭ ĉio	in spite of everything

2. The suffix **-ema** denotes inclination or disposition to do something.

laborema	industrious
timema	fearful, timid
babilema	talkative
dormema	sleepy
helpemo	helpfulness
mensogemo	mendacity, untruthfulness

3. *Antaŭ* combines with *ol* to give the conjunction **antaŭ ol** 'before'.

antaŭ ol mi alvenis before I arrived

Ĉu vi finos la ĉapitron antaŭ ol via mastro revenos?
Will you finish the chapter before your boss comes back?

The conjunction 'after' is **post kiam**.

post kiam mi alvenis after I (had) arrived

Post kiam ŝi estis mallongan tempon en la arbaro, fariĝis nokto.
After she had been a short time in the wood, night fell.

(Logically, there is no reason why one should not rather say *antaŭ kiam* and *post ol.)* Other compound conjunctions involving *kiam* and corresponding to single words in English are **nun kiam** 'now (that)' and **tuj kiam** 'immediately, as soon as'.

Nun kiam vi ĝin mencias, mi tion rememoras.
Now that you mention it, I recall that.

Ni sendos ĝin, tuj kiam ĝi estos presita.
I'll send it immediately it's printed.

---

4. The following are the only **prepositions** commonly used with a following **infinitive.**

anstataŭ:	*anstataŭ protesti*	instead of protesting
antaŭ ol:	*antaŭ ol protesti*	before protesting
krom:	*krom protesti*	apart from/as well as protesting
por:	*por protesti*	in order to protest
sen:	*sen protesti*	without protesting

This usage always implies that the (understood) subject of the infinitive is the same as that of the main clause.

Anstataŭ kompari komunismon kun kapitalismo, Tomaso desegnis serpenton.
Instead of comparing communism with capitalism. Thomas drew a snake.

Antaŭ ol gluti ion, ĝin bone maĉu. Before swallowing something, chew it well.

To translate other types of English phrase involving preposition plus Verb-ing, you will have to turn the sentence differently. The simplest way is usually with *-ado.*

a great amount of protesting	*granda kvanto da protestado*
because of your protesting	*pro* { *via protestado* / *tio, ke vi protestis* }
We were talking about protesting.	*Ni parolis pri* { *protestado.* / *la ebleco* (possibility) *protesti.* }

The danger lay in our not being ready.

La danĝero kuŝis en { *tio, ke ni ne estis pretaj.* / *nia nepreteco.* }

Tio, ke can be glossed 'the fact that'.

---

5. There are also various English constructions involving the 'to' infinitive which have no exact parallel in Esperanto. To translate them, it is necessary to paraphrase.

John is likely to disagree

It is likely that John will disagree.	
or	*Estas probable, ke Johano malkonsentos.*
Probably John will disagree.	*Probable Johano malkonsentos.*

The wires are easy to see.

It is easy to see the wires	*Estas facile vidi la dratojn.*
or	
The wires are easily visible.	*La dratoj estas facile videblaj.*

There is no-one to help me.

There is no-one who would help me. *Troviĝas neniu, kiu helpus min.*

---

6. When the suffix **-igi** is used with a **transitive** verbal root, the meaning is 'to make (someone) do (the action the roots denotes)', 'to have someone X'.

	presigi libron	to have (someone) print a book / to get a book printed
	vekigi iun	to have/get someone woken
(Compare	*veki iun*	to wake someone up)

Note that *-igi* can be paraphrased either as *-antigi* or as *-atigi/-itigi*.

sciigi amikon (pri novaĵo)	to let a friend know (of some news)
sciigi novaĵon (al amiko)	to make known some news (to a friend)

---

7. Countries and their inhabitants.

(i) Sometimes the root names the country. The name of the inhabitant is then formed by adding *-ano* (Leciono 12).

MODEL: *Irako* Iraq *irakano*[1] an Iraqi

Similarly:

Afriko	*Azio*	*Irlando*	*Liberio*	*Niĝerio*	*Sudano*
Alĝerio	*Bolivio*	*Islando*	*Libio*	*Nov-Zelando*	*Tunizio*

Ameriko	*Brazilo*	*Israelo*	*Malto*	*Pakistano*	*Urugvajo*
Antiloj	*Ekvadoro*	*Kanado*	*Maroko*	*Peruo*	*Usono*
Aŭstralio	*Irano*	*Kubo*	*Nederlando*	*Polinezio*	*Zambio*

[1] It is customary to use an initial letter for the name of a country, but not for the name of the inhabitant or for the adjective (iraka). Some argue, though, that it is clearer to use capitals for all, as in English.

(ii) In other cases the root names the inhabitant. The name of the country is then formed by adding *-ujo (-io*[2]*)* or *-lando.*

MODEL: *belgo* a Belgian *Belgujo, Belgio* Belgium

Similarly:

albano	*bulgaro*	*germano*	*italo*	*polo*	*svedo*
anglo	*dano*	*greko*	*japano*	*portugalo*	*sviso*
arabo	*estono*	*hindo*	*kimro*	*rumano*	*turko*
armeno	*etiopo*	*hispano*	*latvo*	*ruso*	
brito[3]	*franco*	*hungaro*	*norvego*	*skoto*	

[2] See Leciono 13. The use of -io in this sense is not found in the Fundamento de Esperanto or in classical Esperanto. It has, however, been in widespread use for many years; it yields forms of greater internationality than -ujo. In 1974 the Akademio de Esperanto rescinded its earlier disapproval of -io wnthout going so far as actually approve it officially. It must be admitted that the whole field of geographical names is one where Esperanto usage is not altogether unanimous.

[3] The United Kingdom = la Unuiĝinta Regno (de Granda Britujo kaj Nord-Irlando).

8. When two nouns or pronouns are in **apposition**, they stand in the same case.

La koko, trumpetisto de la mateno, vekas nin dormantojn.
The cock, trumpeter of the morning, wakes us sleepers.

This also applies to elliptical expressions involving *kiel* or *ol.*

Mi amas vin, kiel frato.	I love you as a brother (i.e. I am your brother, or like a brother).
Mi amas vin, kiel fraton.	I love you as a brother (i.e. you are my brother, or like a brother to me).
Mi amas lin pli, ol vi. *(= ol lin amas vi)*	I love him more than you do.
Mi amas lin pli, ol vin. *(= ol mi amas vin)*	I love him more than I do you.

Note that English 'I love you as a brother' and 'I love him more than you' are structurally ambiguous. The Esperanto equivalents are not.

The situation is different where the second noun is of narrower reference than the first (and English often links them with 'of'). Here the second noun is always nominative.

Ni vizitis la urbon Varsovio.	We visited the city of Warsaw.
Oni prezentis la teatraĵon 'Hamleto'	The play 'Hamlet' was performed.
Ili transiris la riveron Tamizo.	They crossed the river Thames.

Here one could say that *tio estas* (that is, namely) is to be understood between the first noun and the second.

Ekzercu vin! Practise!

9.

Li longe	serĉis laboris luktis *(struggled)* rajdis *(rode)* revis	antaŭ ol	ŝi	persvadis *(persuaded)* devigis	lin	ĉesi. rezigni pri la ideo.
			trovi la fonton *(source)* de la rivero. atingi sukceson. fari veran progreson.			

10.

Finu la kuiradon Riparu la radon Poluru *(polish)* la meblojn Trovu la fadenon kaj la pinglojn *(thread and pins)* Ordigu la dokumentojn	antaŭ ol	li venos hejmen. via patrino vin riproĉos *(tell off, blame)*.
		kudri la kurtenojn *(curtains)*. ŝoveli *(shovel)* la neĝon. sumigi la ciferojn *(add up the figures)*.

11.

Post kiam	la garaĝisto alvenis,	mallumiĝis.
	ni atingis la fundon *(bottom)* de la valo,	fariĝis tre varma.
	mi hejtis *(stoked)* la fornon,	komencis pluvi: falis unu guto *(drop)* post alia.
	Vilĉjo telefonis al la polico,	tondris.
	Maria glitis *(slipped)* sur la glacio,	la suno subiris.
		aperis densa *(thick)* nebulo.


12. *Correct the following sentences (where the asterisk denotes unacceptability).*

* Ĉu vi estas anglano?
* Brigita estas francanino.
* Tadao loĝas en Japano.

13. Studu la suban mapon. Poste, donu instrukcion *(instructions, directions)* por helpi al turisto trovi sian vojon de la hotelo al:

— la katedralo
— la stacidomo
— la banko
— la muzeo
— la universitato
— la restoracio 'La kuirpoto'
— la poŝtejo

Useful expressions: turni sin dekstren *to turn right*
rekte antaŭen *straight ahead*
ĝis la vojkruciĝo *as far as the crossroads*
post cent metroj *in a hundred metres*
supren laŭ la deklivo *up the slope*
trafi tramon *to catch a tram (streetcar)*


LA URBOCENTRO
AVENUO
MALNOVA STRATO
KATEDRALO
VOJO DE L'ESPERO
UNIVERSITATO
VERDA PROMENEJO
L. L. ZAMENHOF
RIVERO
VERDA
PARKO
MUZEO
RIVERVOJO
"LA KUIRPOTO"
PARKVOJO
POŜTEJO
BANKO
BLV. DEL' FUNDAMENTO
LONGA STRATO
PL. MONDA PACO
STELOVOJO
HOTELO
STACIDOMO
STRATO DE AMIKECO
20 40 60 80 100 150 200
metroj
Tramvojo



Leciono 24 — Al la Kunveno

P Ĉi-vespere okazos kunveno de la Klubo. Ĉu ni ĉeestu? Ni aliĝis al la Klubo, sed ĝis nun ni partoprenis nur unu kunvenon. Kiel valoras klubaneco, se oni ne ĉeestas la kunvenojn?

H Mi trovas la kunvenojn tedaj.

P Sed ni ĉeestis nur unu! Mi devas konfesi, ke ĝi ne estis tre interesa; sed ne sufiĉas unu vizito por juĝi, ĉu la kunvenoj estas ĉeestindaj.

H Por mi unu vizito sufiĉas.

P Sed la ideo de membreco entuziasmigis vin! Vi diris, ke vi volas aliĝi. Vi plendis, ke ni neniam eliras vespere en la urbon. Nun, kiam mi proponas ke ni eliru, vi ne konsentas.

H Mi sentis tujan antipation kontraŭ tiu S-ro Braŭn. Mi vere ne komprenas, kial oni elektis lin prezidanto.

P Li estas sperta Esperantisto, kaj li ŝajnas esti lerta prezidanto, kaj tre afabla homo. Almenaŭ, tio estas mia opinio.

H Ho jes, li estas sufiĉe gaja kaj ĉarma, sed mi dubas, ĉu li estas sincera. Kaj mi kompatas lian edzinon.

P Ŝi ne opinias sin kompatinda. Ŝi estas tre kontenta.

H Hm, eble.

P Ne temas nur pri la Klubo. Kiam Georgo kaj Suzana invitis nin al datrevena festeto, mi volis akcepti sed vi rifuzis.

ĉi-vespere : this evening
kunveno : meeting

valori : be of value
klubaneco : club membership (klub- + -an- + -eco)
tedi : bore

entuziasmo : enthusiasm

eliri : go out (el + iri)

tuja : immediate (tuj + -a)
antipatio : dislike, antipathy
kontraŭ : against
prezidi : preside, take the chair
sperta : experienced
lerta : skilful
afabla : nice, kind, affable
gaja : cheerful

kompati : feel sorry for
edzino : wife (edz- + -ino)

festeto : party (fest- + -et- + -o)

H Ili invitis nin nur ĉar ili esperis, ke ni kunportos donacon.

P Fi, vi estas tro suspektema.

H Pli bone suspektema, ol tro kredema! Ne estu stulta! Ĉiuj trompas vin, dum vi vidas nur bonon en ĉies karaktero.

P Tute ne, sed mi ŝatas miajn geamikojn. Amikeco estas grava parto de mia vivo.

H Kaj ĉu ne *mi* estas grava parto de via vivo?

P Kompreneble jes, la plej grava parto, sed ne la tuto.

H Iru do! Iru al viaj ŝatataj geamikoj! Lasu min sola! Mi estas nur via edzino.

P Mi ja iros. Ĝis nun mi estis tre pacienca, sed vi tro incitas min. Mi iros!

(Paŭzo)

H Iru do!

P E – mi ĵus rimarkis, ke mi ŝuldas leteron al mia korespondanto, do eble ...

H Bone, skribu vian leteron, kaj la venontan semajnon ni iros al la Klubo.

P Ĉu vi promesas?

H Mi promesas.

kunporti : bring, take (kun + porti)
donaco : present, gift
fi : for shame
suspektema : suspicious (suspekt- + -ema)
trompi : cheat, deceive
karaktero : character
tuto : whole (tut- + -o)
pacienco : patience
inciti : incite, irritate
e : (hesitation)
ŝuldi : owe
korespondi : correspond
venonta : next (ven- + -onta)
promesi : promise

Notoj — Notes

1. **Active participles.** We have already encountered *-anto* (Leciono 12) and *-anta* (Leciono 16), the endings with which we form present participles active (noun and adjective respectively).

vizitanto	a visitor, someone-who-visits *(= iu, kiu vizitas)*
vizitanta onklo	a visiting uncle

The endings *-into* and *-inta* give corresponding past participles (compare *-is*); *-onto* and *-onta* give corresponding future participles (compare *-os*).

vizitinto	a former visitor, someone-who-has-visited *(= iu, kiu vizitis)*
vizitonto	a prospective visitor, a visitor-to-be, someone-who-will-visit *(= iu, kiu vizitos)*

dum la pasinta jaro	during the past year
dum la venonta semajno	during the coming week (the week about to come)
Falinton ĉiu atakas.	Everyone attacks someone-who-has-fallen (hits a man when he is down).
Mi scias, ke mia Liberigonto vivas.	I know that my Redeemer liveth (my future liberator lives).

---

2. **Adverbial participles** active have the endings *-inte, -ante, -onte.*

Fininte la laboron	Having finished the work ....
Finante la laboron	While finishing the work ....
Finonte la laboron	When about to finish the work ....
Trovinte pomon, mi ĝin manĝis.	{Having found / On finding / After finding} an apple, I ate it
Promenante sur la strato, mi falis.	{While walking / Walking} in the street, I fell.
Mortonte, ni salutas vin.	{Being about to die / When about to die / Before dying} we hail you.

Observe that this furnishes an alternative way of translating English 'before' and 'after'.

The implied subject of an adverbial participle must be the same as that of the main verb. (Otherwise, one has a 'dangling participle', infelicitous in Esperanto as in English.) Note the difference in the following pair.

Mi vidis knabon rigardantan el la fenestro.	{... who was looking ... / ... looking ...}
Mi vidis knabon, rigardante el la fenestro.	{... while I was looking ... / ... while looking ...}

---

3. **Ĉi,** normally reserved for use with *ti*-correlatives, is also occasionally used as a prefix meaning 'this', in adjectives and adverbs,

ĉi-matene	this morning *(= hodiaŭ matene)*
ĉi-sube	below, hereinafter *(= ĉi tie sube)*
ĉi-flanke	on this side *(= ĉi-tiu-flanke)*
ĉi-jara	this year's *(= de ĉi tiu jaro)*

In this usage *ĉi-* is written with a hyphen.

4. **Predicative nominative.** The adjectives in the following sentences are 'predicative' (sometimes termed 'object complement'). They stand in the nominative in Esperanto; they do not take *-n*.

Mi trovas la kunvenojn tedaj.	I find the meetings boring.
Petro farbis la muron blua.	Petro painted the wall blue.
Ni supozis ĝin neekzistanta.	We supposed it (to be) nonexistent.
Li sentas sin malkontenta.	He feels (lit., feels himself) dissatisfied.
Ĉu vi lasos ŝin sola?	Are you going to leave her on her own?

This construction can be analysed as involving an understood *esti*. The nominative after *esti* is of course quite regular.

Mi trovas la kunvenojn (esti) tedaj. I find them (to be) boring.

Exactly the same applies to the noun or noun phrase after the verb in the following.

Li nomis sian filon Miĥaelo. He named his son Michael.

Ĉu ni elektu lin honora membro de la societo?
Should we elect him an honorary member of the society?

---

5. The following somewhat similar construction involves an infinitive after a verb of perceiving.

Mi vidis lin eliri.	I saw him leave.
Ĉu vi aŭdis Georgon kriegi?	Did you hear George shout(ing)?

Compare the following with the examples in 2. above:

Mi vidis knabon rigardi el la fenestro.
I saw a boy look out of the window.

---

6. The suffix **-enda** denotes 'which must be' done.

solvenda problemo a problem to be solved

La kotizoj estas pagendaj en januaro.
Subscriptions are payable (due) in January.

---

7. The prefix **eks-** means 'former, ex-', much as in English.

eksoficiro	an ex-officer
ŝia eksedzo	her ex-husband
la eksreĝo	the ex-king

---

8. The suffix **-ismo** means '-ism', denoting a doctrine or system of thought, much as in English. (Be careful to pronounce it with /s/, not – as in English – with /z/.)

respubliko	a republic	*respublikismo*	republicanism
katoliko	a Catholic	*katolikismo*	Catholicism
serio	a series	*seriismo*	serialism
la rando	the brink, rim	*ĝisrandismo*	brinkmanship

It is also used for '-ism' in the sense of a behaviour pattern, as in English.

alkoholo	alcohol	*alkoholismo*	alcoholism

(but cf.

heroo	a hero	*heroeco*	heroism)

To an *-ismo* there is usually a corresponding *-isto*. The related adjective, however, is often most appropriately *-isma* rather than *-ista.*

krudaj materialoj	raw materials
materialismo	materialism
materialisto	a materialist
materialisma	materialistic

In some apparently similar pairs (words common to many or most languages) the *ism* and *ist* are not suffixes but part of the root.

faŝismo	fascism	*faŝisto*	a fascist

(There is no root **faŝ-* or noun **faŝo.)*

---

9. In **indirect** (reported) **speech**, the **tense** of the *ke*-clause in Esperanto is the same as it would have been if direct speech had been used. (The difficulty here is in English, which has a sequence-of-tenses rule which comes into operation when the introductory verb is past-tense.)

	Li diris, ke li amas min.	He said he loved me.
(cf.	*Li diris, 'Mi amas vin'.*	He said, 'I love you'.)
	Li diris, ke li amis min.	He said he had loved me (but didn't any-more).
(cf.	*Li diris, 'Mi amis vin'.*	He said, 'I loved you (once)'.)
	Li diris, ke li amos min.	He said he would love me.
(cf.	*Li diris, 'Mi amos vin'.*	He said, 'I will love you'.)

Mi pensis, ke	*(a) li skribis.*	*(b) li skribas.*	*(c) li skribos.*
I thought	He had written.	he was writing.	he would write.
(My thought was:	'He's written'.	'He's writing'.	'He'll write'.)

(cf. *Mi pensis, ke li skribus, se mi petus lin.*
I thought he would write if I asked him to.
(My thought was: 'He would write if . . .)).

Ekzercu vin! Practise!

10. *Place*

Vi diris, ke
Mi kredis, ke
Li asertis *(stated)*, ke

before each of the following, and translate carefully.

Petro jam asekuris *(insure)* la aŭton.
Petro baldaŭ asekuros la aŭton.
Pluvo falas konstante *(constantly)*.
Tio estas afero de la spirito *(spirit)*.
La ekrano *(screen)* estas farita el fortika tolo *(sturdy cloth)*.
Vi apogas *(support, back)* mian kandidatecon. (kandidato = *a candidate)*
Tute mankas industrio en nia urbo.
Maria metos la kaŭĉukajn botojn *(boots)* en sian keston *(chest)*.
Ŝi aĉetos novan martelon *(hammer)*, se vi donos al ŝi la monon.
Ŝi aĉetus novan martelon, se vi donus al ŝi la monon.

11.

Mi	opinias trovis	la konversacion la prelegon s-ron Braŭn la kunvenon tiun libron vian kuzon	tre teda. tute stulta. antipatia. treege *(extremely)* interesa. vere ekscita *(exciting)*. praktika *(practical)*. embarasa *(embarrassing)*. ĝenerale *(in general)* bona.

12.

Fininte sian laboron, Vekiĝinte, Fiksinte al la vizaĝo falsan *(false)* nazon, Vidinte la faman *(famous)* aktorinon, (aktoro = *actor)*	Marta Flora Jozefo Karlo Joŝiko Sipho Boris	iris hejmen. aĉetis brikon da tualetsapo *(bar of toilet soap)*. trinkis tutan litron da limonado *(lemonade)*. foriris kun gaja mieno *(look, face, air)*. ĝemis *(groaned)*. rigardis la bruantajn ondojn *(waves)* de la maro.

13. *Repeat the following with* -into, -onto *instead of* -anto, *and translate.*

batalanto	*a combatant*
partoprenanto	*a participant*
okupanto	*an occupant*
preleganto	*a speaker, lecturer (on a given occasion, cf.* -isto)
pekanto	*a sinner*
protektanto	*a protector, patron*
tentanto	*a tempter*

14. Add *-ema, -ebla, -inda, -enda* to each of the following. Use in a sentence, and translate (or, where the limitations of English make that difficult, paraphrase).

EXAMPLE	*manĝ-*	*Li estas manĝema.*	He is greedy (he tends to eat a lot).
		Ĝi estas manĝebla.	It is edible (it can be eaten).
		Ĝi estas manĝinda.	It is worth eating (it's tasty).
		Ĝi estas manĝenda.	It is to be eaten (it's got to be eaten).

memor-
produkt-
trink-
romp-
laŭd- (praise)
pun-
hav-



Leciono 25 — Aktualaĵoj

H Kion vi legas, kara?

P .....

H Petro, ĉu vi fariĝis surda? Kion vi legas?

P Ho, pardonu min, Helena. Mi legas artikolon pri la aktualaj problemoj de la hodiaŭa mondo. La verkinto de la artikolo avertas pri la danĝero de venonta milito.

H Milito estas abomenaĵo. La sola milito, kiun mi povus aprobi, estas tiu, kiu havas justan celon. Ĉiu socio minacata de fremda armeo rajtas defendi sin kontraŭ atako. Minacate, oni defendas sin.

P Konsentite, jes. Sed registaroj emas mensogi pri siaj veraj celoj. Ĉu *vi* fidele obeus ĉiun ordonon kaj ĉiun leĝon, eĉ de malbona registaro?

H Eble jes, pro timo; *(ŝercas)* same kiel mi obeas ĉiun vian ordonon!

P Estas neeble, diskuti kun vi politikajn aferojn. Ĉiam vi komencas ŝerci.

H *(serioze)* Tamen ŝajnas al mi, ke ĉiam tiuj, kiuj estas plej fortaj, aŭ plej bone armitaj, venkas la malpli fortajn. Jen ĉio.

surda : deaf
artikolo : article
aktuala : current, topical
verkinto : writer (verk- + -into)
averti : warn
venonta : coming (ven- + -onta)
milito : war
abomeni : abhor
abomenaĵo : atrocity
justa : just, fair
celo : aim, objective, purpose
socio : society
minaci : threaten
armeo : army
defendi : defend
regi : rule, govern
registaro : government (reg- + -ist- + -aro)
emi : be inclined
fidela : faithful
obei : obey
ordono : order
leĝo : law
politika : political
armi : arm
venki : defeat

P Sed antaŭ momento vi volis paroli pri justaj celoj!

H Ve! Ne ĉiam venkas justa celo.

P Laŭ mi, esence kulpas la homa avaro kaj stulteco. Tio memorigas min pri poemo. Ĉu vi memoras tiun ezopan fablon de la poeto Kalocsay? Ĝi komenciĝas jene:

La ĉeval' kaj bovo ie . . .


ve! : alas!
esenco : essence
kulpa : guilty, to blame
avara : greedy, miserly
memorigi : remind (memor- + -igi)
poemo : poem
Ezopo : Aesop
fablo : fable
poeto : poet

Leciono 25

EZOPA FABLO

La ĉeval' kaj bovo ie
Ekdisputis energie
Pri l' merito
En milito.

disputi : argue, dispute
ekdisputi : start arguing



Diris la ĉeval' incite:
'Eh, malsprite
Estus dubi nian gloron
Kaj valoron.
La ĉevaloj
Al bataloj
Kuri ĉiam estas pretaj
Je l' trumpetaj
Sonoj,
(Iom helpis ankaŭ spronoj)
Kaj la ŝarĝon de l' kanonoj
Tra abruptaj ŝtonoj
Kiuj trenis?
Nur ni!' – la ĉevalo henis.

sprita : witty, smart
gloro : glory
batalo : battle, fight
trumpeto : trumpet
sprono : spur
ŝarĝo : burden
kanono : cannon
abrupta : abrupt (hence here: precipitous)
ŝtono : stone
treni : draw, tow
heni : whinny, neigh




Bov' respondis dum remaĉo:
'Ĉevalaĉo!
Vi ja vane fanfaronas,
Ĉar ni donas
Tamen la plej grandan servon!
Ja al si la cerbon
La marŝalo vane rompas,
Vane pompas
La kuraĝo
Se l' furaĝo
Mankas.
Kaj al kiu dankas
La viandon la soldat' malsata?
Al la bovo malŝatata!
Via gloro sole ŝajnas
Ĉiun venkon *bovo* gajnas.'

maĉi : chew
remaĉi : ruminate, chew the cud
vane : in vain
fanfaroni : boast, brag
cerbo : brain
marŝalo : (field-) marshal
pompi : be resplendent
furaĝo : fodder
soldato : soldier
malsata : hungry
venko : victory

Paŝtis sin melankolie
Ankaŭ la azeno tie.
Ĝi malplaĉe aŭdis,
Ke sin ili laŭdis.

paŝti sin : graze
melankolio : melancholy
azeno : ass, donkey
laŭdi : praise



Ĝi iais
Kaj balais
La aeron per oreloj,
Kaj ekkriis: 'Bagateloj!
Jen la vero
Sur la tero
Se azenoj ne amasus,
La milit' eĉ ne okazus!'

iai : bray
balai : sweep
krii : cry, shout
bagatelo : trifle

K. Kalocsay

see footnote

Notoj — Notes

1. **Elision.** In verse the final *o* of a noun may be omitted, being replaced in writing by an apostrophe. (The accented syllable remains the same.) This applies also to the *a* of *la,* though usually only after a preposition or conjunction ending in a vowel, thus *de l', tra l'*. etc; this is even sometimes encountered in prose and in conversation.

la ĉeval' = *la ĉevalo*
pri l' merito = *pri la merito*

2. We have already met the passive participle endings *-ita* and *-ata* (Lecionoj 11,17, 19). The corresponding nouns (naming the person undergoing the action of the verb) end in **-ito, -ato.**

razito	someone who has been shaved, somebody clean-shaven *(= iu, kiun oni razis)*
razato	someone being shaved, a shavee *(= iu, kiun oni razas)*
arestito	someone under arrest, an arrestee
kaptito	a captive *(= iu, kiu estas/estis kaptita)*
konato	an acquaintance
amato	a loved one *(= iu, kiu estas/estis amata)*

3. **Future participles passive** end in *-ota, -oto.* They are not often used.

farota laboro	work which is going to be done
arestoto	someone due to be arrested

Footnote:

The performance heard on the recording is by Nikolaj Rytjkov, taken from record "Elektitaj Eroj" (© PJS 74, LP001) published by Group Five.

4. **Adverbial participles passive** end in *-ite* (completed action), *ate* (continuing or regularly repeated action) and *-ote* (prospective action).

Arestite, li tuj konfesis.	Upon arrest he confessed immediately.
Kirlate, ovoblanko ekŝaŭmas. (*ŝaŭmo* = foam, froth)	When stirred, white of egg froths up.

Punote, li forkuris; { When about to be punished, / Before being punished, / At the prospect of being punished, } he ran away;

punate, li kriis; { when (being) punished, / as he was being punished, / while undergoing punishment, } he cried aloud;

punite, li ploris. { having been punished, / after being punished, / when punished, } he wept.

These forms are also used with impersonal *esti* and synonyms (compare *estas varme* etc.). They are also occasionally used on their own as interjections.

Estas malpermesite eniri.	It is forbidden to enter.
Restas vidote, ĉu ...	It remains to be seen whether ...
Konsentite!	Agreed.
Dirite, farite!	No sooner said than done.

Note that (unlike English) Esperanto has no 'absolute' participial construction.

The work finished, I went home. NOT **La laboro finite ....*

BUT { *La laboron fininte,*
OR *Kiam la laboro estis finita,* } *mi iris hejmen.*

---

5. In general the *-o* participles *(-into, -anto, -onto, -ito, -ato, -oto)* name persons, not things. Exceptionally, though, they may refer to things, particularly in technical language; thus in mathematics, *dividanto* 'divisor', *dividato* 'dividend'. Although *la estonto* properly means 'the one who will be', it is sometimes encountered in the meaning 'that which will be, the future' (better *la estonteco).*

---

6. A few **abbreviations** in common use.

a.K.	*antaŭ Kristo*	B.C.
bv.	*bonvolu*	please
ĉ.	*ĉirkaŭ*	about, approximately
ekz. *ekz-e*	*ekzemple*	e.g., for example

i.a.	*inter aliaj*	inter alia, among other things
inkl.	*inkluzive (de)*	including
k	*kaj*	and
k.a.	*kaj aliaj*	et al., and others
k.c. / *kc*	*kaj ceteraj (aferoj)*	etc., etcetera
kp	*komparu*	cf., compare
ktp	*kaj tiel plu*	etc., and so on
n-ro	*numero*	number, No.
p.K.	*post Kristo*	A.D.
resp.	*respektive*	respectively; or ... respectively
rim.	*rimarkigo*	remark, note
t.e.	*tio estas*	i.e., that is
t.n.	*tiel nomata*	so-called

7. **Compound tenses.** In principle, any part of *esti* can be combined with any adjectival participle to make a compound tense form. We have already seen how *esti -ita* (Leciono 17) and *esti -ata* (Leciono 19) furnish a passive conjugation. So also *esti -ota:*

La tasko estis (tuj) farota. — The job was (just) about to be done.

Laŭ la projekto de la inĝenieroj, tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj, sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn. — According to the engineers' plans, this railway is due to be built within two years, but I think it will be being built for over three years (will take over three years to build).

Fine la fervojo estis konstruita. — At last the railway was built.

Active compound tenses are much more rarely used. In translating from English it is generally better to use adverbs where necessary in order to convey the force of English compound tenses.

I had seen her. — *Mi estis vidinta ŝin.*
Or, better: *Mi vidis ŝin jam pli frue.*

I was watching TV. — *Mi estis rigardanta la televidon.*
Or, better: *Mi rigardis la televidon.*

If you had told me ... — *Se vi estus dirinta al mi ...*
Or: *Se vi dirus al mi (antaŭe) ...*

The time drew near when he was {due to / going to} become a journeyman.
Alproksimiĝis la tempo, kiam li estis fariĝonta submajstro.

Zamenhof, the initiator of Esperanto, wrote *La formojn kunmetitajn (ekz. 'mi faradas, mi estas farinta' k.c.) oni devas uzi sole nur tiam, kiam la senco ĝin nepre postulas* (Compound forms . . . must be used solely when the sense absolutely demands.'). The influence of the complicated English verb system leads English-speaking learners to tend to overuse them.

8. The **passive** voice, too, must be used with discretion. It is often better Esperanto style to use an active verb with a front-shifted object, as in the Zamenhofan sentence just quoted. Note, further, that the English device of passivizing an indirect object is not admissible in Esperanto.

Igor was given a gold ring.	NOT	**Igor estis donita oran ringon.*
	BUT	*Al Igor oni donis oran ringon.*
	OR	*Igor ricevis oran ringon.*
	OR EVEN	*Ora ringo estis donita al Igor.*

It is only in certain cases that *-iĝi* can properly be used to translate the English passive. *Ora ringo doniĝis al Igor,* for example, while just grammatical, would not be an appropriate way to translate the sentence. The difference between *esti -ata /-ita* and *-iĝi* is that the former tends to imply that the action is performed by an agent *(de iu)*, while the latter tends to imply that the action happens of its own accord, the agent being identical with the grammatical surface subject.

La pordo estas fermata (de . . .)	The door is being closed (by . . .)
La pordo fermiĝas.	The door is closing.
La graso estis fandita.	The fat was melted. (Someone melted it.)
La graso fandiĝis.	The fat melted.

9. The suffix **-ingo** denotes a socket or holder (for one object only).

kandelo	candle	*kandelingo*	candlestick
cigaro	cigar	*cigaringo*	cigar-holder
ŝraŭbo	screw	*ŝraŭbingo*	nut

10. It is a striking feature of Esperanto morphology that **every affix may be used as an independent root.**

aĵo	a thing
eta	tiny
iĝi	to become
ujo	a container
aniĝi	to become a member, join *(= iĝi ano)*
ilaro	equipment *(= aro da iloj)*
eksigi	to expel, disaffiliate *(= igi eksa)*

In the early days of Esperanto, this feature was little exploited. Latterly it has become common, as speakers have come to utilize more fully the latent possibilities of the language.

---

11. It follows that there is no very hard dividing line between what is an affix and what is an ordinary root. The root of *estro,* for example (introduced as an ordinary vocabulary item in Leciono 7) can well be classified as a suffix: *partiestro* party leader, *imperiestro* emperor, *urbestro* mayor, *hotelestro* manager.

The following roots or combinations are often used **prefixally.**

ĉefo	chief, leader	*ĉefepiskopo*	archbishop
		ĉefurbo	capital city
duono	half	*duonhoro*	half-hour
		duonplena	half-full
		duonfrato	half-brother
fi!	fie! for shame!	*fikomerco*	shady business
		fivorto	naughty word
fuŝi	to bungle, mess up	*fuŝkonstrui*	to jerry-build
		fuŝkuiri	to botch (the cooking)
ve!	alas! woe!	*veaspekta*	woebegone
		vespiri	to sigh
vico	row, line; turn	*vicprezidanto*	vice-president
		vicpeco	spare part
		vicfrato	step-brother

---

12. **Idiomatic uses of prefixes.** Note the following, which can be regarded as instances of that great rarity, an Esperanto idiom.

aldoni	to add	*elteni* }	to endure
eldoni	to publish	*elporti* }	
eltrovi }	to discover,	*priskribi*	to describe
elpensi }	invent	*forlasi*	to forsake

El- is also sometimes used to denote completeness of an action.

ellerni to learn thoroughly, to master

elĉerpita exhausted (*ĉerpi* = to draw, as water from a well).

Possible alternatives to *el-* in this sense include *fin-, ĝis-, sat-, tra-, tut-;* but none of them has won general acceptance.

Pri- is sometimes used to make a transitive verb apply to an object different from the one affected by the simple root.

priĵeti iun (per ŝtonoj)	to pelt someone (with stones)
cf. *ĵeti ŝtonojn*	to throw stones
priserĉi pasaĝeron	to search a passenger
cf. *serĉi armilojn*	to look for/search for weapons

Sub- is sometimes used to denote a surreptitious activity.

subaĉeti	to bribe, suborn
subaŭskulti	to eavesdrop

13. In this course we have treated individually every 'official' Esperanto affix, i.e. all those which are part of the *Fundamento* adopted by the First Universal Esperanto Congress, 1905, or which have subsequently been approved by the *Lingva Komitato* or its successor, the *Akademio de Esperanto.* But there are various other, unofficial, affixes used only or mainly in technical language. The only two we will mention here are *-iva,* denoting the ability to do something (a kind of active counterpart to *-ebla),* and *-izi,* meaning to provide with or apply some procedure to.

krei	to create	*kreiva*	creative
elvoki	to call up, evoke	*elvokiva*	evocative
	(but *krea, elvoka* often suffice)		
glui	to glue, stick	*gluizitaj etikedoj*	gummed labels (coated with glue)
hipnoto	hypnosis	*hipnotizi* (or *hipnotigi)*	to hypnotize

Going further, organic chemistry has an international nomenclature which is of strikingly Esperanto-type structure. For example, *polipropileno* (polypropylene) consists of the prefix *poli-* (denoting a polymer), the root *prop-* (indicating that there are three carbon atoms), and the suffixes *-il-* (denoting an alkyl) and *-en-* (denoting an unsaturated hydrocarbon). In biology, the unofficial suffix *-ac-* enables us to form *rozacoj* (Rosaceae), *ulmacoj* (Ulmaceae) from the roots of *rozo, ulmo* (elm), etc. But such matters lie outside the scope of this course.

Ekzercu vin! — Practise!

.... ne plu per libro, sed parolante kaj aŭskultante, skribante kaj legante. Tra la tuta mondo vi povos trovi parolantojn de la Internacia Lingvo Esperanto. Jen via mondo!

In this course we have covered all the main points of Esperanto grammar. If you have listened to the radio broadcasts or the cassettes, you have been exposed to a good pronunciation model. And you have been introduced to quite an extensive vocabulary and seen how to use it in a variety of situations and in discussing a variety of topics. Now you are equipped to *use* Esperanto with speakers from all over the world. Don't hesitate to do so. Join an Esperanto organisation, subscribe to some periodicals, go to conferences and other meetings where you can meet Esperanto speakers, the more international the better. Visit them at home and invite them to visit you. And if you are of a literary turn of mind, do not fail to read some of the quite remarkable literature that has been created in the International Language.

Bonan sukceson!

Jen Nia Mondo

Jen via mondo, jen mia mondo,
kun monta neĝo kaj mara ondo,
de la tropikoj ĝis la polusoj
jen vasta mond' por ĉiuj ni.

poluso : pole

Kiam mi iris sur voj' sen celo,
jen supre brilis blua ĉielo;
kaj orregalo ŝajnis grena valo:
jen vasta mond' por ĉiuj ni.

Vagante, spurojn mi sekvis lerta,
kaj min turmentis soif' dezerta;
dum mi sopiris, iu voĉo diris,
'Jen vasta mond' por ĉiuj ni.'

spuro : track
turmenti : torment
dezerto : desert

Mi la okulojn ŝirmis per mano
kaj mi vidis ondojn de oceano.
La suno dronis, kaj voĉo sonis,
'Jen vasta mond' por ĉiuj ni.'

oceano : ocean

Traduko © Wouter Pilger

Appendix

TRANSITIVE AND INTRANSITIVE

With most verbs, the English-speaking learner experiences no particular difficulty over transitivity. There are, however, a number of verbs which vary between transitive and intransitive in English, while the Esperanto equivalent is always either one or the other; and these can cause difficulty. The following lists contain the most important Esperanto verbs falling into this group.

1. Esperanto root intransitive

These follow the same patterns as *ekzisti, ĝoji, iri, labori, morti, okazi, resti, sidi*, etc. An intransitive verb cannot be followed by a direct object; nor can a passive be formed from it directly. It can be made transitive by adding *-ig-* (14.4).

boli	*halti*	*pezi*
bruli	*koleri*	*soni*
ĉesi	*kreski*	*sonori*
daŭri	*krevi*	*stari*
degeli	*kuri*	*starti*
droni	*kuŝi*	*suferi*
eksplodi	*manki*	*ŝpruci*
enui	*pasi*	*ŝveli*
evolui	*pendi*	*varii*
		veturi

Examples:	*Mi sidis en seĝo.*	I was sitting in a chair.
	Mi sidigis la bebon.	I sat the baby down.
	La prelego daŭris.	The lecture continued.
	Daŭrigu la prelegon!	Continue the lecture.
	Daŭrigu!	Go on! Continue (what you are doing).

2. Esperanto root transitive

These follow the same patterns as *ami, diri, fari, kredi, legi, scii, vidi*, etc. A transitive verb can be followed by a direct object. Alternatively, the direct object may be 'deleted' (understood). Where appropriate to the meaning, the direct object may be reflexive. A transitive verb can be used passively *(-it-*.

-at-, -ot-). It can be made intransitive by adding -iĝ- (16.4). See also 23.6.

adapti	*faldi*	*paŝti*	*svingi*
akceli	*fandi*	*pesi*	*ŝanceli*
apliki	*fermi*	*plekti*	*ŝanĝi*
apogi	*klini*	*renkonti*	*ŝarĝi*
balanci	*kolekti*	*renversi*	*ŝiri*
bani	*komenci*	*rompi*	*ŝuti*
bredi	*komuniki*	*ruli*	*tordi*
ĉagreni	*lavi*	*senti*	*turni*
dividi	*montri*	*skui*	*verŝi*
ekzerci	*movi*	*streĉi*	*vesti*
etendi	*naski*	*sufoki*	

Examples:	*Mi legas libron.*	I'm reading a book.
	Mi legas.	I'm reading.
	Mi lavas min.	I'm washing (myself).
	La libro estas legata.	The book is being read.
	La libro legiĝas bone.	The book reads well.
	Komencu la prelegon!	Start the lecture!
	Komencu!	Begin! Start (what you are going to do).
	Multe komencite, malmulte plenumite.	A lot begun, little done.
	La prelego komenciĝos je la 7-a.	The lecture will begin at 7.

Index

Reference is to lesson (Leciono) and section. Lessons 1 - 12 are in the first booklet *Jen Nia Mondo* and do not have numbered sections. In this second booklet there is no vocabulary index (although every root is glossed on first appearance), since the learner should by now be using a dictionary.

Index

For further study...

When you have thoroughly absorbed the material in *Jen Nia Mondo 1* and *Jen Nia Mondo 2*, you may wish to progress to an advanced textbook. Try

William Auld, *Paŝoj al Plena Posedo*. Budapest — Venaria: Heroldo de Esperanto / Hungara Esperanto-Asocio, 6th edition, 1989. Provides extensive graded extracts from original Esperanto prose written by authors from many countries, together with notes and exercises. Entirely in Esperanto.

You will need a dictionary. We recommend

J C Wells, *Teach Yourself Concise Esperanto and English Dictionary*. London: Hodder Headline Plc, Teach Yourself Books. 21st impression 1997.

Petu librokatalogon de

Esperanto-Asocio de Britio
140 Holland Park Avenue, London W11 4UF

aŭ de

Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
PO Box 1129, El Cerrito, CA 94530

aŭ de

Libroservo de Aŭstralia Esperanto-Asocio
p/a T Elliott, PO Box 230, Matraville, NSW 2036

aŭ de

Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Grupo Kvin — Esperanto en Radio kaj Televido estas kampanjo por atingi ĝuste tion. Grupo Kvin aŭspiciis la originan eldonon de ĉi tiu kurso.

A
GROUP FIVE



production